# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №4



## Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №4 (270)

**Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.**

**Aperas** ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras**: Halina Gorecka

**Redaktas**: Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj**: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij, Alexander Shlafer, Andrzej Sochacki



**Poŝta adreso**: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj**: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

**Retejoj**: http://esperanto-ondo.ru, http://sezonoj.ru


**Perantoj**. Vidu la liston sur p. 63-64.

**Abontarifo por 2017**

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj
Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj
Pollando: 60 zlotoj
Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

**Anonctarifo**

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)
Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)
Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)
Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)
Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj**: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

**Recenzoj**: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj**: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.


“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №4 (270).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 апреля 2017 г.


© La Ondo de Esperanto, 2017.

# En ĉi tiu numero

Bazaj informoj pri *La Ondo de Esperanto* . . . . . 2
En tiu ĉi numero . . . . . 3

**Temo . . . . . 5**
Lu Wunsch-Rolshoven. Membronombroj de UEA: Malkresko de jardekoj . . . . . 6

**Eventoj . . . . . 9**
José Antonio del Barrio. Inaŭguro de la jaro Zamenhof en Hispanio . . . . . 10
TEJO en Tutmonda Festivalo . . . . . 12
Stefano Keller. CDELI 60-jara! . . . . . 13
Liba Gabalda. La 11a Mediteranea Esperanto-Semajno . . . . . 15
Irina Gonĉarova. Tridek programeroj por tridek aperoj . . . . . 17
Amri Wandel en Ruslanda televido . . . . . 19
Bharat K Ghimire. Esperanto sonas en Himalajo . . . . . 20
Maritza Gutiérrez. Kubo: Esperanto kaj packulturo en la Zamenhof-Jaro . . . . . 21
Jéssica Botelho. Ateliero por neesperantistoj partnere organizita . . . . . 22
Irina Gonĉarova. Esperanto-Poŝtkruciĝo . . . . . 23
José Antonio del Barrio. Hispanoj kongresos ĉe geamantoj . . . . . 24
La Pollanda kongreso okazos en Bjalistoko . . . . . 25
La kvara Interlingvistika Simpozio dediĉita al Zamenhof . . . . . 26
Aleksander Korĵenkov. 150 tagoj da informado . . . . . 27
Koncize (9 informoj) . . . . . 29

**Tribuno . . . . . 30**
Carlo Minnaja. Pri la Laborplano de UEA . . . . . 31
Erdem Akbaş. Lingvistika esploro pere de Esperanto en la universitato Erciyes (Tr. Vasil Kadifeli) . . . . . 34
Leterkesto (Jean-Luc Tortel, Luís Ladeira) . . . . . 35
Zlatko Tišljar. Per la angla lingvo la usona kaj brita imperioj sklavigis la mondon . . . . . 36
Aleksander Korĵenkov. La feliĉa Nordio . . . . . 37

**Arkivo . . . . . 38**
Aleksander Korĵenkov. Ho, mia kor', ne batu maltrankvile... . . . . . 39
Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2017 . . . . . 46
Jam kvin jarkolektoj de *La Ondo* libere legeblaj . . . . . 46

**Kulturo .......... 47**
Leonid Andrejev. Bargamoto kaj Garasko: Rakonto (Tr. Igor Sokolov) .......... 48
Paŭlo Moĵajevo. Lepuileca, sed neniel liliputeca!
(Recenzo: Ĵak Le Puil. *Sen elizi'*: KD) .......... 55
Ricevitaj libroj .......... 56
Ricevitaj gazetoj .......... 57
Nikolao Gudskov. Lingvaj militoj en Galaksio .......... 58
*Literatura Foiro*, 2017, №285 .......... 58

**Mozaiko .......... 59**
Pri kiu temas .......... 60
Valentin Melnikov. Versportreto 7 .......... 60
Pri kio ridis Zamenhof .......... 61
Spritaj splitoj kaj preskeraroj .......... 62
Kiel aboni *La Ondon* .......... 63


**Sur la kovropaĝo.** De la 23a ĝis la 26a de februaro 2017 en la ĉefurbo de Litovio okazis la tradicia 18a Vilna Librofoiro kun pli ol 62 mil vizitintoj kaj kvarcent kulturaj renkontiĝoj. Ankaŭ Esperanto partoprenis en la foiro danke al la kunlaboro de studentoj de la Vilna Universitato kaj aliaj Vilnaj esperantistoj: Mindaugas Žuromskas, Ieva Judickytė, Margarita Dautartienė kaj aliaj. En la foiro ili informis pri Esperanto kaj ties movado, vendis librojn en/pri Esperanto, disvastigis faldfoliojn kun konciza gramatiko de la internacia lingvo. (Gediminas Degėsys)

**Ni en la reto:**

**La Ondo de Esperanto: http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm**
**Abono 2017: http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm**
**Elŝuteblaj libroj: http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php**
**Novaĵretejo La Balta Ondo: http://sezonoj.ru/**
**Radio Esperanto: http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/**
**Halina en FB: https://www.facebook.com/halina.gorecka.3**
**Aleksander en LJ (ruse): http://sezonoj.livejournal.com/**
**Ruslingva informretejo: http://rusa.esperanto-ondo.ru/**

# *Temo*

**«La individuaj membronombroj de UEA pasintjare ne falis, sed falegis kompare kun la antaŭa jaro. Estis redukto de 5501 (2015) al 4365 membroj (2016), malaperis 1136 homoj, do pli ol 20 procentoj. Eble tio sonas kiel io eksterordinara – sed ŝajne tiu falego estas ne aparte signifa», – skribas la berlina Esperanto-aktivulo Lu Wunsch-Rolshoven en sia artikolo, kiu malfermas la aprilan Ondon.**



# Membronombroj de UEA: Malkresko ekde jardekoj

La individuaj membronombroj de UEA pasintjare ne falis, sed falegis kompare kun la antaŭa jaro. Estis redukto de 5501 (2015) al 4365 membroj (2016), malaperis 1136 homoj, do pli ol 20 procentoj. Eble tio sonas kiel io eksterordinara – sed ŝajne tiu falego estas ne aparte signifa. La fenomeno kunmetiĝas el du partoj – la natura ondumado de ĉiuj statistikaj nombroj, ĉi-kaze ĉefe pro la malsamspecaj UK-oj en ambaŭ jaroj, kaj la multjara malkreska tendenco ĉe UEA, jam ekde 1991. Ni rigardu la du subtemojn kaj iom la eblajn kaŭzojn.

En 2015 okazis la jubilea centa Universala Kongreso en Lillo, ĝin partoprenis laŭ la oficiala statistiko 2698 homoj. En la posta jaro sekvis la natura reduktiĝo al nuraj proks. 1252 aliĝintoj en Nitro, do malkresko je proks. 1446 homoj. Estas tiel, ke aliĝi al UEA, kiam oni volas partopreni la tiujaran UKon, estas finance interesa oferto; multaj homoj tial aliĝas speciale en siaj kongresjaroj – kaj eble ne rekotizas en la posta jaro, se ili tiam ne partoprenas en kongreso. Se konsideri tion, la membronombra reduktiĝo je 1136 homoj supozeble estis pli malpli natura konsekvenco el la kongresnombra ŝanĝiĝo. La eliro el la regula ĉiujara membroperdo ĉe UEA ne okazis de 2015 al 2016, sed de 2014 (5027 individuaj membroj) al 2015 (5501); tio estis nekutima kresko je preskaŭ 500 membroj kaŭzita de la jubilea kongreso. Jam antaŭaj jaroj estis pli bonaj ol normale.

La mezuma jara perdo ĉe la individuaj membroj de UEA ekde 1991 estas ĉ. 150 homoj; ĉiujare malaperas du ĝis tri procentoj de la membroj. En 1991 individue membris ankoraŭ 8071 homoj. Oni povas multe demandi sin pri la kaŭzoj de tiu daŭra perdo. Unu klarigomodelo estas, ke por multaj membroj de UEA la membriĝo estas pli malpli aĉeto – ili ricevas la jarlibron aŭ la gvidlibron, aldone la revuon elektronike aŭ papere. La demando do estas, ĉu la servo valoras la prezon. Por multaj homoj gvidlibro kaj jarlibro ne plu havas multan utilon; mi ekzemple metis la pasintjaran gvidlibron en la bretaron, kiam mi ricevis ĝin, kaj mi ne plu tuŝis ĝin. Kiam mi serĉas adreson aŭ alian informon, mi rigardas rete; simple por mi estas pli praktike.

La allogaĵo de la kategorio Membro-Gvidlibro estas la inkluzivita reta abono de la revuo. Eble tio estas la kaŭzo, kial inter 2015 kaj 2016 la nombro de gvidlibro-membroj apenaŭ malkreskis (371 post 375), dum kontraste la nombro de jarlibro-membroj draste malkreskis de 2020 al 1384 (minus 31%); ĉe revu-abonantaj membroj la falo estis 24 % (de 1753 al 1341); tiuj kategorioj rajtigas je kongresa rabato.

La revuo certe liveras multajn belajn artikolojn – sed la sperto montras, ke eĉ Esperanto-aktivuloj povas travivi ankaŭ sen ĝi. Ekzistas aliaj revuoj kaj ekzistas multaj retaj artikoloj. Ni krome konsciu, ke jara perdo de nur kelkaj procentoj estas relative malmulte por papera revuo kompare kun la drastaj perdoj, kiujn devis travivi multaj gazetoj en la ekstera mondo; ĉe kelkaj la abonantaro duoniĝis ene de jardeko. Oni povas supozi, ke la pli maljuna Esperanto-generacio nuntempe fidele plu abonas la revuon *Esperanto* (la prezo estas eltenebla kompare kun la ceteraj kostoj

## Membrostatistiko de UEA. 1980–2016

| Jaro | IM | AM | Sume | Jaro | IM | AM | Sume |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1980 | 6629 | 27554 | 34183 | 1999 | 7074 | 12096 | 19170 |
| 1981 | 6727 | 29828 | 36555 | 2000 | 6583 | 12522 | 19105 |
| 1982 | 6556 | 29768 | 36624 | 2001 | 6428 | 14889 | 21317 |
| 1983 | 6446 | 31062 | 37508 | 2002 | 5713 | 10549 | 16262 |
| 1984 | 6272 | 32923 | 39195 | 2003 | 5714 | 11264 | 16978 |
| 1985 | 6536 | 33020 | 39556 | 2004 | 5854 | 12148 | 18002 |
| 1986 | 6679 | 33910 | 40589 | 2005 | 6107 | 12253 | 18360 |
| 1987 | 7291 | **36351** | **43642** | 2006 | 6066 | 11732 | 17798 |
| 1988 | 7203 | 35945 | 43148 | 2007 | 6011 | 11477 | 17488 |
| 1989 | 7355 | 32474 | 39829 | 2008 | 5702 | 12492 | 18194 |
| 1990 | 7645 | 25224 | 32869 | 2009 | 5713 | 12605 | 18318 |
| 1991 | **8071** | 19146 | 27217 | 2010 | 5288 | 10527 | 15815 |
| 1992 | 7783 | 18808 | 26591 | 2011 | 5321 | 10480 | 15801 |
| 1993 | 7272 | 16041 | 23313 | 2012 | 5046 | 10057 | 15103 |
| 1994 | 7018 | 14495 | 21513 | 2013 | 4903 | 10019 | 14922 |
| 1995 | 7237 | 13808 | 21045 | 2014 | 5027 | 9789 | 14816 |
| 1996 | 7284 | 13314 | 20598 | 2015 | 5501 | 9215 | 14716 |
| 1997 | 7113 | 13018 | 20131 | 2016 | **4365** | **8689** | **13054** |
| 1998 | 7360 | 12812 | 20172 | | | | |

IM: Individuaj membroj de UEA. AM: Aligitaj membroj de UEA

de vivo en unu jaro), sed ke la juna generacio ne vidas multan kialon aboni ĝin. Ĉu tiu supozo estas vero, tio ne estas klara, ĉar la aĝostrukturoj de UEA-membroj kaj de la abonantaro ŝajne ne estas facile troveblaj en publikaj fontoj.

### Redaktopolitiko por la revuo *Esperanto*

Eble ludas rolon ankaŭ la “Redaktopolitiko por la revuo *Esperanto*”. Laŭ ĝi la plej grava celo de la revuo estas “prezenti ĝustan, ĝisdatan kaj inspiran bildon pri la agado kaj strategio de UEA”. La “grandaj movadaj evoluoj” ekster UEA venas poste, forumo “por movadaj diskutoj, unuavice pri la agado de UEA, duavice pri aliaj movadaj temoj” sekvas kiel tria kaj “respeguli la tutan buntecon de la Esperanta kulturo kaj komunumo” havas la lastan lokon. Homo, kiu interesiĝas ĉefe pri kulturo kaj komunumo de Esperantujo sekve eble ne tro multe trovas siajn interesojn en la movade kaj UEA-teme orientita revuo. Kelkfoje ŝajnas, ke UEA deziras reprezenti la tutan Esperanto-komunumon – aliflanke la revua redaktopolitiko montras alian bildon, kun UEA kaj ties interesoj en la centro. Indas legi ankaŭ la ceteron de la redaktopolitika UEA-regularo.

Ni krome konsciu, ke la paperaj jarlibro kaj revuo komencis sian ekziston antaŭ cento da jaroj, kiam la kondiĉoj en la mondo estis sufiĉe aliaj. Eble ambaŭ povos plu ekzisti, sed eventuale nur kun reduktita eldonkvanto. Eble UEA devos daŭrigi la serĉadon, kiujn ofertojn la Esperanto-publiko nuntempe pli multe aprezos kaj pretos aĉeti.

Certe oni povas argumenti, ke membriĝi en UEA estas pli ol nur ricevi jarlibron kaj revuon. Tute klare – sed la libroservo estas malferma por ĉiu kaj same la Universala Kongreso; la rabatoj ludas rolon, sed evidente ne senfinan, almenaŭ ne post la fino de la kongresa jaro.

Krome oni povas atentigi, ke UEA deziras reprezenti la tutan Esperanto-parolantaron antaŭ la ekstera mondo kaj ke ĝi celas "disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto", kiel formulas tiun celon la UEA-statuto. La malkreskantaj membronombroj tamen indikas, ke la hodiaŭa Esperanto-publiko estas ne plu tro entuziasma pri tiuj aspektoj; Esperantujo entute pli kaj pli kreskas, dum UEA ne.

Iam la membronombroj de UEA eble estis indiko pri la bonfarto de Esperantujo. Hodiaŭ Esperantujo kreskas grandparte ekster la organiza strukturo de UEA. Retejoj kiel Vikipedio, Tatoeba aŭ Reta Vortaro organiziĝas memstare. Facebook ofertas personajn kaj instituciajn retpaĝojn; krome tie eblas krei Esperanto-grupojn kaj ĉiu homo povas kontribui per Esperanto-tradukoj de la Facebook-tekstoj. Eksterkomunumaj retaj lernejoj pli kaj pli ofte ofertas Esperanto-kursojn – konataj ekzemploj estas Duolingo kaj Memrise. Ĉe Google Translate oni facile povas kunlabori sen aliĝo. Retpaĝojn pri Esperanto kreas ankaŭ multaj unuopuloj kaj grupetoj. La muzika kulturo grandparte vivas ekster la kerno de UEA. Multaj Esperanto-sciencistoj sendepende agas en siaj rondoj. Ankaŭ la kreskanta denaskula mondo bone organiziĝas memstare.

Se oni estas tre entuziasma pri tradiciaj strukturoj, oni eble bedaŭras tiun evoluon al sendependiĝo. Se oni deziras fortan kreskon de Esperantujo, oni kontraste eble ĝojas, ke la Esperanto-komunumo fariĝis multcentra kaj havas multajn iom konkurencantajn organizaĵojn, kiuj – cetere – profitas unu de la alia kopiante sukcesajn ideojn. Tiu multeco kaj plureco forte subtenas la kreskon. Ankaŭ la movado por progresigi kaj kreskigi Esperantujon ne plu estas ekskluziva tereno de grandaj asocioj: Malgrandaj unuoj, projektaj grupoj sen plia organiza kadro, atingas bonajn sukcesojn en multaj kampoj, de lingvoretejoj ĝis filmo-subtekstigo kaj Esperanto-adaptado de komputilaj programoj.

Resume ni povas konstati, ke la ĵusa membrara malkresko estis granda, sed la multjara tendenco estas la pli grava fenomeno. Ĉiukaze ni povas plenanime laŭdi la movadajn strukturojn, kiuj progresigis Esperantujon ĝis tiu grado, ke ĝi nun pli kaj pli memstaras. La daŭra kresko de Esperantujo estas subtenata kaj rapidigata ankaŭ de multaj organizaĵoj ekster UEA kaj eĉ ekster Esperantujo.

**Lu Wunsch-Rolshoven**
EsperantoLand

# *Eventoj*

***Prizamenhofa prelego de la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) José Antonio del Barrio, okazinta la 2an de februaro en la jud-kultura centro Sefarad-Israel en Madrido (vidu p. 10-11), estis la unua ero en la eventoserio, planita kaj efektivigata de HEF okaze de la Zamenhofa Jaro 2017. Pliaj jubileaj eventoj de HEF okazis en februaro kaj marto en Madrido kaj Cheste, kaj ili daŭros en Sevilo kaj aliaj urboj de Hispanio.***





# Inaŭguro de la jaro Zamenhof en Hispanio

Hispana Esperanto-Federacio (HEF) komencis en februaro la aktivadojn programitajn por la Jaro Zamenhof. Ĝi estis inaŭgurita la 9an de februaro en la publika biblioteko de la kvartalo Vallecas, en Madrido. Tiu loko estis elektita, ĉar en tiu biblioteko situas la Centro de Pola Kultur-intereso de Madrido, kreita de la registaro de la Madrida regiono por montrado kaj utiligo de la kulturo de la komunumoj de enmigrintoj, sub la aŭspicio de la Pola Insituto de Kulturo en Madrido.

La inaŭguron partoprenis la direktoro de la Biblioteko, Carmen García-Risco, la direktoro de la Pola Instituto, Mirosława Kubas-Paradowska, kiu konvinke montris la apogon de la instituto al la agado de la esperantistoj en la Jaro Zamenhof, la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, kaj la direktoro de Fundación Esperanto, Manuel Pancorbo. Dum la prezentado oni konfirmis, ke la Hispania organizaĵo de blinduloj ONCE dediĉos unu el la biletoj de sia fama loterio, tiun de la 8a de aŭgusto ĉi-jara, al d-ro Zamenhof. Oni kompletigis la prezenton per gvidata vizito al la ekspozicio pri Esperanto kiu dum tiuj tagoj estis montrata en la halo de la Biblioteko.

Iom antaŭe, la 2an de februaro José Antonio del Barrio prelegis pri Zamenhof en la Centro Sefarad-Israel, kreita de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj por flegi la rilatojn kun la juda kulturo, kies sidejo troviĝas en historia palaco en la plej centra strato de Madrido. Dum la prelego estis pritraktita ankaŭ la konekto de Zamenhof kun la juda kulturo de lia tempo kaj la historia kunteksto de lia verkaro kaj idearo. Poste sekvis intervjuo en radio Sefarad rilata al la juda kulturo por hispanlingvanoj.

La ekspozicio pri Esperanto kaj Zamenhof vojaĝis poste al Cheste, urbeto en la provinco Valencio, kiu havas de jardekoj tre longan tradicion pri Esperanto, kaj estas sidejo de la historia klubo “Lumradio”.

La ekspozicio, kiu konsistas el serio da paneloj pretigitaj de HEF, ĉi-okaze kun aldono de bildo kun fotoj kaj gazetaraj informoj rilataj al la historio de Esperanto en Cheste, plus diversa materialo havigita de la loka grupo, estis montrita en la Teatro Liceo, historia kultura konstruaĵo de la urbo. Ĝi estis inaŭgurita la 3an de marto per ceremonio, kiun ĉeestis granda publiko. Ĝi estis prezentita de José Manzanera, la prezidanto de la grupo, kaj parolis dum ĝi la urbestro, José Morell, la urbkonsilisto pri kulturo, María Angeles Llorente, kaj la prezidanto de HEF.

La urbestro kaj la urbkonsilistino per varmaj paroladoj substrekis la riĉan historion de Esperanto en Cheste, en kiu tri stratoj portas la nomojn de esperantistoj, kaj montris sian apogon por ke tiu tradicio plu daŭru. Dum la sekvaj tagoj la loka grupo gvidis vizitojn al la ekspozicio, inter ili por lernejanoj *(vidu la suban foton).*

En aprilo la ekspozicio vojaĝos al la universitato de Sevilo, kaj poste al aliaj urboj de la lando. Pri aliaj planoj kaj atingoj ni informos en venontaj numeroj.

**José Antonio del Barrio**






# TEJO en Tutmonda Festivalo

Ana Stretcu kaj Klara Ertl reprezentis TEJO-n en Tutmonda Festivalo de Ideoj por Daŭripova Evoluo (Global Festival of Ideas for Sustainable Development) en Bonn, Germanio. La evento organizita de UN (Unuiĝintaj Nacioj) okazis de la 1a ĝis la 3a de marto 2017. Dum la Festivalo oni diskutis pri la plej taŭgaj kaj efikaj manieroj atingi ĝis 2030 la 17 daŭripovajn celojn de la Tutmonda Tagordo de UN.

En la evento estis diskutoj, laborgrupoj, zono de virtuala realo. La Festivalo estis kompreneble ankaŭ bona okazaĵo por ke la homoj/organizoj povu koni unu la alian.

La Festivalo estis la unua "ludebla konferenco" ĉar estis apo specife pretigita por la evento, per kiu la homoj povis ludi kaj kunlabori por atingi la daŭripovajn celojn. Kaj estis eĉ specifa novaĵkanalo kiu prezentas kiel la situacio evoluas – CNN. Estas ankaŭ kanto kiu helpas memori la 17 daŭripovajn celojn.

Ana kaj Klara estas parto de la KER teamo de TEJO (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj). Ana estas volontulino en la Centra Oficejo en Roterdamo kaj Klara ofte okupiĝas pri aferoj rilate al UNITED kaj Unesko.

Laŭ Tejo.org

Aliĝu al la teamo de tejo

# CDELI 60-jara!

Trideko da partoprenantoj kunvenis la 18an de marto en la biblioteko de La Chaux-de-Fonds (Svislando) por celebri la 60-jariĝon de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI).

Tazio Carlevaro, la ĉefpreleganto, enkonduke priskribis la kvarlingvan Svislandon, kiel riĉan eksperimentejon rilate al lingvoj kaj lingvoplanado. Rimarkindas la alta multlingveco de la svisoj rilate al loĝantoj alilandaj. Grupo da svisoj adoptis novan lingvon: Esperanton. Ekzistas homgrupoj, kiuj adoptis alian lingvon ol Esperanto, sed kun same “speciala” origino.

Carlevaro klarigis, ke en tia medio CDELI estas ne nur utila, sed absolute necesa. Indas kontribui al la kreo de kulturo de interkompreno. Ilo por tion faciligi estas la konstruo de komuna memoro. Supozeble, la sinteno de Edmond Privat, aktiva defendanto de Esperanto, estas bona vojmontrilo. Li estis ekzemplo por neagresema maniero alfronti la multecon de la planlingvaj movadoj. CDELI naskiĝis en la spirito de Privat, sed la faktan laboron faris kelkaj gravaj pioniroj, al kiuj ni estu dankemaj:

La kontribuintoj al la festprogramo (de maldekstre): Tazio Carlevaro, Nicole Margot, Mónika Molnár, Nancy Fontannaz, Stefano Keller, Luko Allemand, Claude Gacond. (Fotoj: S.Keller, W.Carrier)



– Disĉiplo de Privat: Claude Gacond, kiun helpis ekde la komenco lia edzino;

– La biblioteko kaj la urbo La Chaux-de-Fonds;

– Multegaj sindediĉaj bonvolaj helpantoj, donacantoj, vizitantoj, esplorantoj, amikoj;

– La iama sinergio kun KCE.

Li menciis kelkajn pliajn ĉefajn kunlaborintojn de CDELI: Alphonse Matejka, Claude Piron, André Schild, Ric Berger, Reinhard Haupenthal, István Szerdahelyi, Ivo Lapenna, Andreas Juste, Verloren van Themaat k. a.

En CDELI okazas scienca arkivado, kiu faciligas sciencan esploron. CDELI estas vivanta arkivejo, ĉar ĝi kolektas materialon, valorigas ĝin, kaj faciligas multrilate la sciencan esploron en interlingvistika kaj esperantologia kampoj. Ĝi estas ne nur libro-kolektejo, sed ankaŭ prilaborejo, kiu malfermas siajn pordojn al esploremuloj kaj disponigas al tiuj modernajn laborinstrumentojn. En ĝi la scienca kaj kultura agadoj estis kaj plu estas gravaj.

Carlevaro listigis kelkajn gravajn atingojn, kiuj montras, ke CDELI kapablas kunlabori en taskoj malfacilaj, por atingi celon en scienca kampo:

– Ellaboro kaj disvastigo de esperantologiaj temoj kaj interlingvistiko: CDELI-kunvenoj, delonge organizitaj, kaj dediĉitaj al la profundigo, studo, ellaboro de temoj, kiuj rilatas Esperantan literaturon, lingvon, interlingvistikon, branĉojn de esperantologio;

– *Universalaj lingvoj en Svislando* (verko de Andreas Künzli);

– Arkivo de leterinterŝanĝo Louis Couturat kaj Bertrand Russell;

– Du kunvenoj pri planlingvoj, kies referaĵoj estis eldonitaj kaj konservitaj;

– Ido-Konfero en Joingny (Svislando, 1981) kun aldona kultura seminario parte ĉe KCE (Kultura Centro Esperantista) kaj ĉe CDELI;

– La arkiva riĉaĵo de CDELI estis la bazo, sur kiu kreskis alia grava verko, la *Bibliografio de Ido*, kiu reaperis en dua eldono aktualigita en 2005 (R. Haupenthal, T. Carlevaro);

- Danke al CDELI, KCE kaj SES inter 1994 kaj 1996 Tazio Carlevaro ellaboris enketon pri la tiama konsisto de la svisa esperantistaro.

Luko Allemand parolis pri neologismoj de la junularo, kiujn li lernis en internaciaj renkontoj. Claude Gacond klarigis la originon de la esprimo “ne krokodilu”. Nicole Margot parolis pri la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL). Mónika Molnár prelegis pri la rolo de Esperanto en la lernejo La Grande Ourse, kie ŝi instruas. Stefano Keller faris mallongan prezentadon pri CDELI kaj ties kunlaborantoj, klarigante la opajn labortaskojn necesajn por la funkciado de la centro: arkivado, katalogado, servoj al esploristoj, eventoj kaj Esperanto-instruado.

Ĉeestantaj lernantoj de 105 studsabatoj de CDELI (2003-2017) ricevis atestilojn. La plej fidela lernanto partoprenis 94-foje! Diversaj libro-premioj kaj ekzempleroj de la *Kultura Kajero* de CDELI estis disdonitaj.

**Stefano Keller**

# La 11a Mediteranea Esperanto-Semajno

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en suda Francio por de la 4a ĝis la 11a de marto kune ĝui agrablan semajnon ĉe la Mediteranea bordo. Partoprenis 101 ge-esperantistoj el 13 landoj. Alvenis reprezentantoj el Anglio, Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Litovio, Ruslando, Svedio, Svislando kaj la plej multaj el Francio. La plej juna estis la unujara knabineto Rosaria, filino de la geedza paro Marek kaj Veronika el Ĉeĥio. La semajnon organizis Christine Graissaguel kaj Monique Prezioso kun helpo de aliaj esperantistoj. La programo ne estis streĉa, sed interesa. Temis ĉefe pri instruado, promenadoj kaj kulturaj vesperoj. Ankaŭ la hotelo proponis programon, kiun ni povis profiti.

Ni loĝis en belega feriejo Vacanciel en la hotelo *Val d'Esquière*, ĉirkaŭata de ampleksa trihektara parko por agrablaj promenadoj sub majestaj pinarboj. En la pasinteco ĝi estis palaco. La mirinda loko troviĝas inter la urboj St. Raphaël (15 km) kaj St. Tropez (24 km).

Sabate la 4an de marto vespere ĉiuj alvenintoj kolektiĝis por preni aperitivon proponitan de la hotelo. La direktoro de la hotelo Silvain Ceccoto kun la urbestro Jean-Paul Ollivier bonvenigis nin. La dua invito al aperitivo okazis vendrede vespere. Manĝoj estis kutime abundaj kaj bongustaj. Ne mankis variaj desertoj kaj glaciaĵoj, blanka kaj ruĝa vinoj.

Post la unua komuna vespermanĝo prezentiĝis la gvidantoj de la kursoj. Dum la semajno okazis kvar diversnivelaj Esperanto-kursoj. Verajn komencantojn inicis al Esperanto Christine Graissaguel el Francio. Iom pli progresemajn instruis Nina Korĵenevskaja el Ruslando. Marek Blahuš el Ĉeĥio proponis kurson helpe de sia komputilo. Dalia Pileckienė el Litovio paroligis esperantistojn, dividitajn en kvin grupetoj, pri diversaj temoj pli malpli el psikologia vidpunkto.

La kursoj okazis antaŭtagmeze kaj posttagmeze antaŭ la vespermanĝo. Dum la paŭzo je la 10a horo ni povis trinki teon aŭ kafon kun diversaj biskvitoj kaj ĉokolado. Dum la semajno funkciis libroservo. Ĉi-foje oni vendis brokantaĵojn. En la hotelon venis vendistoj, kiuj ofertis diversajn artiklojn por aĉeti. En la ĵurnalo *Var-matin* aperis artikolo pri nia evento kun komuna foto.

Dimanĉe posttagmeze okazis festo en la apuda urbeto Roquebrune-sur-Argens. Pro iom tro malvarma kaj venta vetero ĝi estis ne tiel impona kaj homamasa kiel pasintjare. Diversaj metiistoj prezentis okkilogramajn ĉokoladajn tabulojn kun bildoj, kiuj estis poste aŭkciataj. Gesinjoroj Gabalda aĉetis unu «tabulon», dispecetigis ĝin kaj dum la kafo-paŭzoj ili regaladis kursanojn dum la tuta semajno.

Merkrede posttagmeze ni ekskursis al la proksima urbeto Cogolin, kies simbolo estas la koko. Ni rimarkis ĝin plurfoje dum la promenado kun loka ĉiĉeronino. Ŝi rakontis al ni ĝian historion. La urbo fieras pro sia horloĝturo. Ĉiujare en majo en la urbo okazadas la tradicia festo Bravaĵoj de la sankta Maŭro (la patrono de Cogolin) por celebri la bataleman historion de la komunumo. La urbo estas ĉefe konata

pro fabrikado de pipoj kaj pro manproduktado de tapiŝoj. En la malgranda familia entrepreno, kie estas produktataj pipoj, finiĝis la ekskurso. Revenvoje ni ankoraŭ haltis ĉe la haveno de Port-Grimaud. Ĉiutage post la tagmanĝo estis libera tempo por mallongaj promenadoj kaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo.

Ĉiuvespere ni ĝuis kulturajn prezentadojn. La pentroarton de Salvador Dalí prezentis Nina Korĵenevskaja. Raita Pyhälä parolis pri Finnlando. André Weber bilde vizitigis al ni la urbon Schwerin en Germanio. Marek Blahuš skizis la historion de Ĉeĥio kaj parolis pri la universitata urbo Brno. Proksime de Brno troviĝas la fame konata batalkampo Austerlitz. Ĉiujare en decembro tie okazas spektaklo rememore al la venko de Napoleono. Dalia Pileckienė prezentis la litovan lingvon. Tre impresa kaj bone aranĝita estis la duhora bildprezento pri Vjetnamio de Jean-François Cousineau.

La lasta vespero konsistis el prezentadoj de ĉeestantoj. La kursanoj pretigis diversajn amuzajn skeĉojn, deklamon de poemo kaj estis sprite klarigitaj kelkaj konfuziloj. Ne mankis tombolo en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero finiĝis per dankoj al la organizantoj kaj kursgvidantoj. Sekvis dancado akompane de akordiona muziko.

**Liba Gabalda**

Foto: Liba Gabalda



# Tridek programeroj por tridek aperoj

La 23-26an de februaro 2017 apud Moskvo pasis AntaŭPrintempa Esperanta Renkontiĝo (APERo-11). Iom pli ol 30 homoj partoprenis la iom malpli ol 30 programerojn kadre de ĉi tiu tradicia renkontiĝo, kiun ĉiufebruare organizas la Moskva Esperanto-Asocio MASI okaze de sia propra naskiĝtago.

El multaj skribaj impresoj pri la renkontiĝo mi elektis kelkajn de diversaĝaj esperantistoj kun diversaj movadaj spertoj. Mi esperas, ke iliaj rakontoj pruvas, ke APERo estas ankaŭ por vi – kaj vi venos la sekvan februaron al APERo-12!

**Irina Gonĉarova**,
kunordiganto de MEA MASI

En perfekta amikeca etoso la 23-26an de februaro pasis la vica 11-a APERo.

Ĝin partoprenis 32 esperantistoj el Moskvo, Rigo, Arĥangelsko, Uljanovsko, Novoĉerkasko, S-Peterburgo. La organizanto, Moskva Esperanto-Asocio «MASI», trovis bonegan formon de la renkontiĝo, interesan kaj por spertaj esperantistoj pro la riĉa programo kaj amika etoso, kaj por progresantoj, kiel bona paroliga aranĝo.

Ĉi tie ne estis pasivaj konsumantoj. Ĉiuj laŭ siaj kapabloj estis engaĝitaj en la riĉan programon. Dum la programo, manĝado, promenado ĉiam estis uzata nur Esperanto, kio estas bonega tradicio de APERoj.

**Mikelo Ĉertilov**
estrarano de REU, Esperanto-aktivulo dum kelkaj jardekoj

La temo de ĉi-renkontiĝo estis "Metamorfozoj". Pro tiu temo estis organizataj sufiĉe multe da prelegoj. Ekzemple, la 24an de februaro Nikolao Gudskov faris tri prelegojn: "Metamorfozoj en la scienco", "Metamorfozoj en lingvokonstruado" kaj "Metamorfozoj en Esperanto-movado". Krome, okazis kelke da ludoj, el kiuj plejparton organizis Mikaelo Povorin, kaj unu – Jurij Karcev (temas pri "Kio? Kie? Kiam?"). Gaje pasis la Teatra kaj Poezia vesperoj (danke al Irina Gonĉarova) kaj tradukista konkurso, kiun organizis Larisa Ŝapoŝnikova. Bedaŭrinde, mi ne vizitis la antaŭajn APERojn; do mi ne povas kompari. Sed tiu ĉi, mia unua APERo, vere estis brila!

**Petro Fedosov**
12-jara gimnaziano, aktivulo de MEA MASI ekde 2015,
En APERo-11 gajnis la 1an lokon en la Tradukista Konkurso

Estis mia unua fojo kiam mi partoprenis en Esperanta renkontiĝo. Ĉiuj partoprenantoj devis paroli Esperante! Mi timis, ke mi ne komprenos aŭ ne scipovos diri tion, kion mi volas. Sed mi komprenis Esperanton kaj parolas Esperante "elegante"! Mi estis kaj restis kontenta. Ni ne havis liberan tempon, ĉar ĉiuj deziras viziti ĉiujn programerojn. Ni ludis multe, kaj ĉiuj ludoj estis tre interesaj kaj kognaj. Ni ankaŭ aŭskultis prelegojn de Nikolao Gudskov, Irina Gonĉarova, Julija Samsonova



Foto: Marija Verzun

kaj aliaj. La prelegoj estis tre interesaj kaj diskut-temaj. Mirinde, ke mi komprenis preskaŭ ĉion, kion la prelegantoj diris. Tio estis malkovro por mi kaj ĝojigis min! Ni ankaŭ spektis kvar teatraĵojn kaj aŭskultis la koncertojn de Sergeo Straŝnenko kaj Mikaelo Povorin. Ĉio estis bonega, kaj mi deziras danki al organizintoj pro la renkontiĝo kaj interesa riĉa programo.

**Jurij Smirnov**

36-jara, du tagojn antaŭ la APERo finis la bazan Esperanto-kurson FaRo-48,
Post APERo aliĝis al MEA MASI

La ĵusa APERo ege ĝojigis min pro la bonega amikeca etoso kaj nova sperto pri la organizado! Ĉi-foje mi respondecis pri la programo kaj mi tre feliĉas, ke ĉiuj programeroj estis realigitaj… Mia plej ŝatata programero estis “Faru vian propran animacian filmeton!”, organizita de Alisa Zingerman kun grava teknika helpo de Aleksandr Basov… Agrablas, ke pri APERo interesiĝas multe da homoj, kaj ĉiujare partoprenantoj venas el diversaj urboj, ne nur el Moskvo. Gravas, ke malgraŭ strikta lingva disciplino komencantoj kuraĝas veni kaj pretas ne krokodili. Karaj komencantoj, eĉ se vi silentas la tutan eventon, vi multe spertas kaj eklernas. Venu sentime, ja APERo estas por vi organizita! Dankon al ĉiuj pro la vica bonega MASI-evento!

**Sofja Zareckaja**

23-jara, FaRo-lerninto de la 2015
MASI-aktivulino ekde 2016, membro de la Organiza Teamo de APERo-11

Por mi APERo-11 estis jam la sesa! Kaj ĉiam ĝi estas diversa. Multaj novuloj ĉiuAPERe kreas tute freŝan atmosferon. Kaj la ardaj gefanatikuloj de la aranĝo konstante aldonas ion interesan al la programo, krom ke ili estas garantio de la perfekta amikeca etoso. Sed la strikta lingva disciplino – tio ĉiamas!

Estis por mi mirakla kaj escepte utila programero – farado de animaciaj filmetoj, ĉar tiu ĉi agado estas interaktiva, grupamikiga kaj rezultodona. Jen ni kune laboris – jen ni tuj havas utiligeblan rezulton de nia laboro. Kun granda plezuro mi partoprenus aŭ organizus similajn programerojn dum la sekvaj APERoj.

**Julia Samsonova**
24-jara, FaRo-lerninto de la 2011, MASI-aktivulino

Ĉi-jare mi partoprenis APEROn la sesan fojon… Jen denove nia kvina dometo, jam konataj kaj ankoraŭ nekonataj vizaĝoj, salutoj-interbrakumoj-konatiĝoj-demandoj…Tiu neripetebla gemuta etoso, kie harmonie miksiĝas seriozaj prelegoj kaj “porka orgio”, disputoj kaj kantoj, rido kaj tristo, frenezaj ideoj kaj komunaj planoj, eksteraj aŭ enaj metamorfozoj, kiuj okazas al la homoj dum tiuj tagoj… APERo estas malgranda modelo de la mondo, por kiu revis kaj laboris Zamenhof: la homoj kun diversaj opinioj, vivpozicioj, politikaj vidpunktoj ktp kunvivas, interparolas Esperante kaj kunlaboras pace kaj amike. Almenaŭ dum tri tagoj…

**Irina Gorodeckaja**
Novoĉerkassk, Esperanto-Klubo “NovoĈek”

---

# Amri Wandel en Ruslanda televido




Tri semajnojn post gazetara konferenco de NASA pri la malkovro de sunsistemo Tarappist-1 kun sep terecaj planedoj, kelkaj kun potencialo de vivo, prezentita la 22an de februaro 2017 kaj vaste raportita en la amaskomunikiloj tutmonde, la granda Ruslanda televida kanalo PEH TB elsendis unu-kaj-duon-horan dokumentan filmon pri ekstertera vivo.

En la filmo, kiun laŭ la taksoj de la kanalo spektis ĉ. kvin milionoj da televidantoj, enestas longa intervjuo kun la esperantista astrofizikisto Amri Wandel el Israelo. La intervjuo prezentas la esplorojn de Wandel, kiuj kvazaŭ inaŭguris tiun malkovron. La intervjuantoj interpretas la intervjuon, kvazaŭ ĝi kontraŭas la malkovron, publikigitan en la gazetara konferenco. Tiu argumentado estas iom kurioza, konsiderante ke la intervjuo kun Wandel okazis unu semajnon antaŭ la publikigo. Spektebla ĉe:

https://www.youtube.com/watch?v=rCkBZr6yg14&feature=youtu.be&t=4472




Esperantistoj sur Tara Hill Top *(Foto: Ján Vajs)*

# Esperanto sonas en Himalajo

La 12a Himalaja Renkontiĝo okazis de la 26a de februaro ĝis la 8a de marto 2017. Partoprenis la tutan programon 38 esperantistoj, kaj simila nombro partoprenis nur parton. Inter la partoprenantoj estis 15 personoj el Japanio, ses el Slovakio, po du el Danlando kaj Usono, po unu el Tajvano, Germanio kaj Vjetnamio; ĉiuj ceteraj estis nepalanoj. La ĉi-jara celo estis konigi naturon kaj kulturon pere de Esperanto per ekologia piedmarŝado.

La programo komenciĝis la 26an de februaro per akceptado de la gastoj. La landa asocio NEspA bonvenigis ilin la 27an en la hotelo "Marsangdi" en Thamel. La sestaga piedvagado komenciĝis la 1an de marto post du tagoj dediĉitaj al ekskursoj en la Katmandua valo. Ni ekmarŝis de Kawukhola kaj la 4an de marto atingis Tara Hill Top (ĉ. 2900 m), trairinte Tanting (1900 m), Sikles (2000 m). Krom unu nokto en Tara Hill Top, ni ĉiam restis en etnaj vilaĝoj. Ni manĝis tiel, kiel vilaĝanoj.

La 8an de marto en la sama hotelo okazis la solena ferma ceremonio, en kiu NEspA disdonis al la partoprenintoj atestojn kaj la nepalajn ĉapojn "Topi". La ĉeestantoj faris aplaŭdojn, komentojn kaj sugestojn por la estontaj Himalajaj Renkontiĝoj. La renkontiĝon fermis la prezidantino de NEspA Inud Devi Thapaliya kaj la ĉefo de la renkontiĝo LP Agnihotri.

**Bharat K Ghimire**

# Kubo: Esperanto kaj packulturo en la Zamenhof-Jaro

De la 15a ĝis la 19a de marto okazis la sesa Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KER), ĉi-foje en la centra provinco Villa Clara, en la feriejo Rio Seibabo. La renkontiĝon ĉeestis pli ol 115 geesperantistoj el la tuta lando.

La unuan tagon kunsidis la Komitato de Kuba Esperanto-Asocio (KEA), kiu analizis la jaran raporton por 2016, elektis novan estraron kaj skizis la ĉefajn agadojn por 2017, inter kiuj elstaras la intensigo de kursoj bazaj kaj progresigaj. Konkretiĝis agadplano okaze de la Zamenhof-Jaro, estas planataj eventoj en la orientaj provincoj Granma kaj la Zamenhofa Metiejo en Guantánamo.

La programo de KER sub la devizo “Esperanto kaj packulturo en la Zamenhof-Jaro” ekis la 17an per seminario pri informado, okazis ankaŭ ateliero pri protektado kaj konservado de nia heredaĵo. Okazis paroligaj kursoj, bazaj kaj mezaj ekzamenoj, kunsido de la Kuba ILEI-sekcio, kunsido pri Zamenhof-Jaro, literatura rondo, elŝutejo, radioamatoroj, ekskurso al historia loko ĉe la montoĉeno Escambray, kie situas la feriejo. La vesperaj aranĝoj inkluzivis prezenton de filmo pri la grupo *Amindaj* kaj la urbo Contramaestre, oni spektis la muzikvideon konkursantan en “Teo kaj Amo”; la variaj vesperoj estis riĉigitaj per la arto de kubaj esperantistoj.

Je la fino oni ĝenerale rekonis la laboron de la instruistaro per transdono de atestiloj, premiis la plej bonajn instruistojn, ankaŭ la plej bonan filion de KEA, nome tiun en Santiago de Kubo, oni anoncis la rezulton de la literatura konkurso, kiun gajnis Carmen Duvel Lachatagnerey, kaj prezentis la novan estraron por la venontaj tri jaroj sub la prezido de Maritza Gutiérrez González.

La 6a KER finiĝis per pozitiva bilanco kaj estis anoncite ke venontjare ĝi ne okazos, ĉar la kuba esperantistaro sin preparas por akcepti en Havano la 9an Tutamerikan Kongreson de Esperanto de la 11a ĝis la 17a de februaro 2018.

**Maritza Gutiérrez**






# Ateliero por neesperantistoj partnere organizita

La 1an de marto Legio de Bona Volo (LBV) partnere kun Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), okazigis en San-Paŭlo atelieron pri Esperanto en la Komunuma Centro por Sociala Asistado "D-ro Osmar Carvalho e Silva".

Per tio oni celis veki la intereson de la loka komunumo lerni la lingvon internacian, plivastigante ĝian kulturan akiraĵon. La aranĝo estis dividita je du partoj. En la unua parto la partoprenintoj ĉeestis prelegon de d-ro Paulo Sergio Viana, tradukisto tre konata en la esperantista medio, multjara amiko de LBV kaj nuna vicprezidanto de EASP. Li parolis pri la origino kaj valoro de Esperanto, kaj pri agadoj por diskonigi ĝin en la mondo.

En la dua parto José Roberto Tenório da Silva prezentis interagan kaj viglan lecionon pri la gramatiko de la lingvo. La ateliero plenumis sian celon prezenti Esperanton al la publiko, kiu siavice havis la okazon enskribiĝi en kvarmonata ĉeesta kurso proponata de EASP por tiuj kiuj volas profundigi siajn konojn pri la lingvo.

Sur tablo EASP ekspoziciis klasikaĵojn brazilajn kaj tutmondajn tradukitajn al Esperanto kaj librojn originale verkitajn en la lingvo de Zamenhof. Inter la eksponitaj libroj troviĝis la furoraĵo *Meditadoj el la Animo*, verkita de Paiva Netto.

La atelieron ĉeestis dekoj da personoj el ĉiuj aĝoj. En la fino, la partoprenantoj ricevis ĉeesto-atestilon. Poste okazis lotumado de memoraĵoj, okazo en kiu la ĉeestantoj povis jam praktiki la numeralojn en Esperanto.

**Jéssica Botelho**

# Esperanto-Poŝtkruciĝo

MEA MASI refunkciigis la internacian aktivadon "Esperanto-Poŝtkruciĝo"! En 2013 ĉi-distraĵon lanĉis Julia Samsonova okaze de la Internacia Tago de Poŝto (kiu okazas la 9an de oktobro). La ago elvokis internacian intereson kaj eĉ trafis en la revuon *Esperanto* kiel nova junulara iniciato. Sed la aktivado estis porokaza, kaj ĝi rapide estingiĝis. Tamen ekde tiam nin persekutis la ideo revivigi ĝin kiel konstantan esperantistan aktivadon.

Ĉu ne estas bona ideo sendadi belajn mansurskribitajn bildkartojn al la engaĝitaj esperantistoj, hazarde elektitaj de la aŭtomata sistemo? Ĉu ne estas agrable surpriziĝi trovinte en sia ĉeporda poŝtkesto surkartajn salutojn en Esperanto de nekonataj samlingvanoj el ajnaj landoj kaj regionoj? Ni kredas, ke troviĝos multaj dezirantoj partopreni tiun amiksentan poŝtludon!

Eble vi aŭ via Esperanto-lernanto estas tia homo? Do, ne prokrastu – aliĝu tuj! Venu al la ĵuskreita paĝaro (http:// bildkarto.weebly.com) kaj plenigu tre simplan aliĝilon. Vi **tuj** ricevos retpoŝte ies adreson! Elektu en papervendejo bildkarton, surskribu ĝin kaj sendu en la poŝtejo. Kaj atendu surprizojn en via poŝtkesto! Ĝuu la belecon de la bildkartoj kaj la amikemon de esperantistoj el la tuta mondo!

**Irina Gonĉarova**
kunordiganto de MEA MASI



# Hispanoj kongresos ĉe geamantoj




Teruel (Teruelo) estas urbo tiel ofte forgesata, ke ĝi sukcesis konigi sin en Hispanio per la ampleksa disvastigo de la slogano "Teruel ja ekzistas!", kiu fariĝis kvazaŭ simbolo de la provoj de la loĝantoj de la centra Hispanio atentigi pri ties grava senpopoligo. Sed ĝi celis veki la atenton ankaŭ al la beleco kaj la atrakciaĵoj de la urbo kaj la ĉirkaŭa regiono. Ĝi sukcesis: ĝuste tiu senpopoligo konservis la arkitekturan havaĵon, kaj speciale la mudeĥaran arton (tiun de la muzulmanoj restintaj en la kristanaj regnoj de mezepoka Hispanio post ties reokupo), agnoskitan kiel Homara Heredaĵo fare de Unesko. Ankaŭ la naturo montras apartan belecon en tiu duon-montara regiono.

La alia tuja respondo, kiun oni ricevas en Hispanio ĉe la mencio de Teruelo, estas spontanea aludo al "la Geamantoj". Temas pri tre konata legendo, ofte portretita en la hispana literaturo, pri juna paro, Diego kaj Isabel, kiuj mortis pro la neeblo kuniĝi pro sociaj diferencoj. La legendo baziĝas sur faktoj ŝajne okazintaj ĉirkaŭ la jaro 1217, do pli ol du jarcentojn antaŭ la pli famaj Romeo kaj Julieta. La supozata tombo de la realaj homoj, unuiĝintaj nur post la morto, estas nun ofte vizitata maŭzoleo, kaj motivo por ĉiujara festo dum kiu multaj homoj surhavas por la okazo mezepokajn vestaĵojn. En tiu ĉi jaro oni celebras do la 800an datrevenon de la okazaĵo, kaj la urbo profitos la koincidon por eĉ pli diskonigi sin.

Ĝuste tiun urbon Hispana Esperanto-Federacio elektis por sia ĉi-jara Kongreso. Ĝi okazos inter la 23a kaj la 25a de junio, kaj la slogano ne povos ne aludi al tiu festado: "Teruelo, urbo de amantoj, amantoj de Esperanto". La loka urbestraro inkludis la kongreson inter la eventoj de la urba celebrado, kaj profitos la okazon por doni la nomon "placo de Esperanto" al publika spaco de la urbo.

La muzikaj koncertoj disvolviĝos en historia gastejo ("fonda") en la centro de la urbo. Nin akompanos *Kajto*, kiu (eble unuafoje) rekuniĝos kvarope por sia 30a datreveno, Martin Wiese, kaj lokaj artistoj.

La ĝeneralaj sesioj okazos en la universitataj instalaĵoj, kaj ili enhavos prelegojn de diverslandaj invititoj, prezentadon de libroj, ekspoziciojn, debatojn, kursojn, ekzamenojn, ktp.

Ne mankos turismaj vizitoj al la urbo mem, kaj ankaŭ al la historia urbo Albarracín, kiu estis dumtempe ĉefurbo de unu el tiuj regnoj (tajfoj) kiuj sendependiĝis post la disfalo de la islama kalifujo en Hispanio, kaj kiu aparte fidele konservis sian historian heredaĵon. Eblos viziti ankaŭ la restaĵojn de la batalo de Teruelo, unu el la plej ferocaj dum la hispana interna milito.

Por tiuj, kiuj deziros resti kaj profiti la vojaĝon, oni organizos prezentadon en

Madrido, la 21an de junio, antaŭkongresan viziton en Teruelo la 22an, kaj du samtempajn seminariojn postkongresajn, la 26an kaj 27an, unu organizatan de TEJO por junulaj aktivuloj, kaj alian por maturiĝo/maturiĝintoj, konekse kun celebradoj de la Jaro Zamenhof.

Ne timigu vin la aludoj al la senpopoligo, eĉ se ĝi estas tiom zorgiga el socia vidpunkto ke la areo estas foje nomata "la suda Laponio". Jam en 2016 (vidu *La Ondo de Esperanto*, 2016, №2) ni invitis vin al alia simile fora regiono, pro similaj problemoj nomata "La Siberio", kaj tamen evidentiĝis ke la elekto estis tute trafa, kaj ke ĝi rezultis en unu el la plej belaj spertoj kiujn la partoprenintoj povis ĝui. Ni trafos nun tre similan travivaĵon, en urbo kiu varme akceptos nin, kaj kie oni povos ĝui pejzaĝojn kaj monumentojn kiujn la ordinaraj turistoj al Hispanio nur malofte tuŝas. Kaj kun superba etoso, kutima ĉe la hispanaj kongresoj, kiun mi povas nur rekomendi.

Pliaj informoj: http://www.esperanto.es/kongreso

**José Antonio del Barrio**




# La Pollanda kongreso okazos en Bjalistoko

La 36a Pola Esperanto-Kongreso okazos en Bjalistoko la 12-14an de majo 2017 sub la aŭspicio de Unesko kadre de la Jaro de Zamenhof.

En la programo troviĝos, interalie: prelegoj, filmoprezentado, koncertoj, promenoj tra la Esperanto-urbo, malfermaj Esperanto-kursoj kaj ekskurso al la urbo Tykocin. Tuj antaŭ la kongreso, vendrede matene, Podlaĥia Libraro invitas al scienca konferenco dediĉita al Zamenhof.

La reta aliĝilo: http://kongreso.hol.es/eo/partopreno/

Kontaktu la organizantojn http://kongreso.hol.es/eo/kontakto/ por ekscii pliajn detalojn. Vizitu la eventon ĉe Facebook https://www.facebook.com/events/395125997495145/.



# La kvara Interlingvistika Simpozio dediĉita al Zamenhof

La Interlingvistikaj Studoj (Lingvistika Instituto, Adam Mickiewicz Universitato en Poznano, Pollando), kiuj festas sian 20-jariĝon ĉi-jare, organizas sian kvaran internacian Interlingvistikan simpozion la 21-22an de septembro 2017 en Poznano, inter la kutima septembra interlingvistika sesio kaj la tradicia kultura festivalo Arkones.

La ĉefa temo estas: "Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo". La simpozio havos apartan sekcion dediĉitan al Zamenhof tiel festante la 100-jariĝon de lia morto, kiun ankaŭ Unesko metis en sian kalendaron de festataj elstaraj personecoj en 2017 kaj estos malfermita al vasta publiko. La temaro rilatas al la ideo de dialogo inter nacioj kaj kulturoj alfrontante lingvajn kaj kulturajn defiojn ekde la 19a jarcento ĝis hodiaŭ kaj la rolo de internaciaj lingvoj.

Prelegoj pri la sekvaj temoj estas bonvenaj (en esperanto, la angla kaj pola):

- **Zamenhof: vivo kaj verkaro**
- internacieco kaj internaciaj lingvoj ekde la 19a jarcento
- lingvopolitiko en plurlingvaj landoj
- lingvaj defioj en la ŝanĝiĝanta Eŭropo
- **diversaj aspektoj de Esperanto**:
    - o Lingvistiko: la rolo kaj strukturo de la internacia lingvo
    - o Literaturo kiel portanto de internaciaj valoroj kaj temoj
    - o Instruado: modernaj metodoj
    - o Esperanto-movado por lingvaj rajtoj kaj egaleco

Limdato por prelegproponoj: 31.05.2017 (ne estas konferenca aliĝkotizo). Jam anoncis sian kontribuon profesoroj Věra Barandovská-Frank, Nicolau Dols Salas, Sabine Fiedler, Ilona Koutny.

Aliĝo kaj informoj: interlingv@gmail.com

# 150 tagoj da informado



La 27an de oktobro 2016 en la novaĵretejo La Balta Ondo (http://sezonoj.ru) aperis la novelo *Dankesprimo* de Julian Modest. Ekde tiu tago en ĉi tiu novaĵretejo ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. La 26an de marto estis la 150a tago en ĉi tiu senprecedence longa seninterrompa serio. Ĉi tiu "ronda" nombro estas bona preteksto por resumi la funkciadon de la retejo.

La Balta Ondo estis lanĉita je la Zamenhofa tago 2010. Nun en ĝi estas 1410 artikoloj (afiŝoj, laŭ la terminaro de WordPress). Krome en la retejo estas dek konstantaj paĝoj (Liro, Kiosko k. a.) kaj pluraj subpaĝoj. La artikoloj estas distribuitaj laŭ 16 kategorioj kaj markitaj per 1853 temaj etikedoj. La artikolojn sekvas 2 mil 351 aprobitaj komentoj de niaj legantoj.

En aŭgusto 2011 ĉe La Balta Ondo ekfunkciis la vizit-kalkulilo Counterize, kiu ebligas vidi plurajn informojn pri la vizitado de nia retejo. Kompreneble, robotoj kaj la administranto, kiu ĉiutage venas al la paĝo pro administraj bezonoj, estas ekster la statistiko. Malgraŭ la filtrilo de Counterize kaj malgraŭ la kontraŭspamaj kromprogramoj, ĉiutage la administranto mane forigas dekojn (iam eĉ centojn) da vizitoj registrataj de Counterize, kaj rezulte ni havas sufiĉe fidindajn informojn pri la reala vizitado de la retejo.

Ekde aŭgusto 2011 en nia retejo okazis 525 mil 369 paĝovizitoj (angle: "hits"). Ne kalkulante la vizitojn de la ĉefpaĝo kaj la vizitojn per kategorioj kaj etikedoj, ni konstatas, ke jam 330 mil 398 fojojn estis vizititaj konkretaj afiŝoj.

En la listo de la plej ofte vizitataj artikoloj en La Balta Ondo plej supre plu estas la unua parto de la eseo "Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto", verkita de Dennis Keefe.

**Pli ol milfoje estis legitaj jenaj 22 tekstoj:**

3660 Dennis Keefe: Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto (1)
2178 Aleksander Korĵenkov: Kiom da esperantistoj en Ruslando? Ne malpli ol 992
1338 Halina Gorecka: Chuck Smith: la Esperantisto de la Jaro 2015
1335 Grigorij Arosev: Postprezidaj meditoj
1305 Halina Gorecka: Peter Baláž: la Esperantisto de la Jaro 2012
1288 Aleksander Korĵenkov: Kie kongresi post tri jaroj?
1250 Komitatano Z: Hundoj bojas, karavano vojas
1244 La Ondo de Esperanto en 2016
1227 Aleksander Korĵenkov: La Unua Libro *(Nia trezoro)*
1225 [Aleksander Korĵenkov, Flo Martorell]: Katastrofo ĉe Vinilkosmo

1211 José Antonio Vergara: Esperanto estas multe pli valora ol speco de malangla aŭ identecofonto de supozata "popolo"

1172 Trevor Steele: Ĉu malesperi?

1170 Halina Gorecka: *La hobito* reaperis

1148 Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov: Iom pri *La Ondo de Esperanto*

1136 Rekomendo de la Akademio pri la uzo de propraj nomoj

1132 Halina Gorecka: Tolkien en Esperanto: Nova e-libro

1082 Zlatko Tišljar: Josip Broz Tito *(Nia trezoro)*

1079 Grigorij Arosev: Kio estas la reala trezoro de REU?

1064 Andreas Künzli: Inter finvenkismo kaj raŭmismo

1032 Brian Bishop: Volapuko havas novan Cifal!

1022 Andreas Künzli: Baudouin de Courtenay *(Nia trezoro)*

1017 Dennis Keefe: Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto (2)

Kvankam La Balta Ondo estas novaĵretejo, la plej legataj tekstoj en ĝi estas ne Esperanto-novaĵoj, sed plejparte artikoloj kaj intervjuoj pri la problemoj de la Esperanto-movado, kiuj dum jaroj ne perdas sian aktualecon. Nur la 23an lokon en la popularec-listo okupas la plej legita artikolo pri Esperanto-kongreso, nome, la artikolo de Jukka Pietiläinen pri la pasint-jara 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra.

Vidu la liston de la plej legataj (pli ol 500-foje) prikongresaj artikoloj:

999 Jukka Pietiläinen: Mondkongreso en malgranda urbo (UK-101, Slovakio, 2016)

978 Halina Gorecka: BET-49: Interesaj kaj agrablaj tagoj en Utena (Litovio, 2013)

797 Jukka Pietiläinen: Rejkjaviko – malgranda kaj intima (UK-98, Islando, 2013)

719 Katalin Kováts: La unua kursaro sur la Esperanto-Insulo (Ĉinio, 2012)

695 Anna Maria Koniecpolska-Lachowska: ARKONES: Oni ne povas kabei… (ARKONES-29, Pollando, 2013)

671 Katarína Nosková: SES plena je surprizoj (Slovakio, 2013)

612 Maria Nazaré de C. Laroca: Neforgesebla NASK 2013 (Usono, 2013)

569 Halina Gorecka: BET-52: Pli ol tricent verdstelanoj en la verda urbo (Litovio, 2016)

556 Jukka Pietiläinen: 99a Universala Kongreso de Esperanto (Argentino, 2014)

552 Françoise kaj Flo!: FESTO 2013: Estis bonega festivalo! (Belgio, 2013)

537 Nikolao Gudskov: SAT-Kongreso en (ne tro) suna Jalto (Ukrainio, 2012)

517 Jukka Pietiläinen: La jubilea kongreso (UK-100, Francio, 2015)

505 Jukka Pietiläinen: Hanojo – eburtura kongreso (UK-97, Vjetnamio, 2012)

501 Trezoro Huang Yinbao: Esperanto por la azia kunlaboro (8a Azia Kongreso de Esperanto, Ĉinio, 2016)

**Aleksander Korĵenkov**

✪ 6 mar 2017 Ewa Szkdelska k Huang Lin, kulturoficistoj de la pollanda ambasado en Ĉinio, vizitis la E-Muzeon en la Zaozhuang-a Universitato (orienta Ĉinio); oni decidis en septembro 2017 okazigi ekspozicion pri Zamenhof k pola kulturo en la antikva urbo Tai'erzhuang, kiu simile al Varsovio estis detruita en la Dua Mondmilito k poste rekonstruita. *(El Popola Ĉinio)*

✪ 2 mar 2017 interkonsenton pri instruado de Eo subskribis la lernejo Hadegnon en Calavi, apudurbo de Kotonuo (Benino) k la asocio "Scio Sen Bariloj"; ĉiuj instruistoj k la direktoro ĉeestis la unuan lecionon. (Mireille Grosjean)

✪ La Bavara Ŝtata Biblioteko informis la Munkenan E-Klubon, ke ĝi planas je la 100a mortodato de Zamenhof instali virtualan rondiron tra la vivo de la kreinto de Eo. (EK Munkeno)

✪ 25 feb en la programo X-faktoro de la litovia televido TV3 kun la kanto *Maro* konkursis kantistino el Visaginas Veronika Konan; ŝi sukcese prezentis kanton en Eo k promociiĝis al la sekva konkursetapo. (Vytautas Šilas)

✪ Perla Martinelli k Giorgio Silfer per oficialaj akreditivoj reprezentis Feminisman E-Movadon k la redakcion de *Literatura Foiro* en la 39a Internacia Festivalo de la Femina Filmo, okazinta meze de marto apud Parizo. (HeKo)

✪ "Lingvoilo" (LanguageTool) estas liberkoda plurlingva programo por kontroli ortografion, gramatikajn erarojn k stilon de tekstoj en Eo k pluraj aliaj lingvoj; oni povas ne nur uzi ĝin en ĝia retejo, sed oni povas elŝuti kromaĵon por sia retumilo. La prizorganto k programisto de "Lingvoilo" estas Dominique Pelle. (Ret-Info / Lingvo-Studio)

✪ Progresas la preparado de broŝuro pri la Ea literaturo, kiu celas prioritate la PEN-anaron (pli ol 13 mil verkistojn en pli ol cent tridek landoj); la franclingva varianto, pri kiu zorgas Marie-France Conde Rey, estos preta ĉi-jare; pri la hispanlingva k la anglalingva variantoj okupiĝas Andrés Martín respektive Chiara Macconi. (HeKo)

✪ Je 30 mar 2017 al la 102a UK, kiu okazos ĉi-somere en Seulo, aliĝis 905 personoj el 58 landoj; plej multe (198) el la kongreslando Koreio, sekvas Japanio 146, Ĉinio 81, Francio 73, Brazilo 34, Germanio 32, Ruslando 26, Pollando 25, Usono 21. (uea.org)

✪ La Komitato de Kultura Centro E-ista proponas al la Asembleo de la kulturcentro, kunvenonta en Ĉaŭdefono 14 apr 2017, la trian numeron de la monata informilo sub la titolo "La eta heroldo de KCE" k la subtitolo "monata informilo de Kultura Centro Esperantista". La titolo memorigas litertipe la antikvan de *Heroldo de Esperanto*, uzitan ĝis la pasinta jaro. (HeKo)

# Tribuno

***En la marta Ondo debutis nia nova rubriko "Vidpunkto", en kiu pri la nuna stato kaj estonteco de Esperanto parolas konataj aktivuloj, kies opinioj ne estas tute identaj kun la ideoj de la nunaj gvidantoj de la Esperanto-movado.***

***Ĉi-foje en la nova rubriko gastas Carlo Minnaja, kiu dediĉas sian atenton al kelkaj punktoj rilataj al kulturo en "Strategiaj prioritatoj de UEA 2013-2017" (apendico de la "Strategia Laborplano de UEA 2013-2017")***



# Pri la Laborplano de UEA



## de Carlo Minnaja

De jardekoj mi ne plu havas respondecojn en UEA, mia lasta komitatana mandato finiĝis verŝajne en 1980; do komentado de la longa kaj certe skrupule redaktita Laborplano de UEA 2013-2017 estas ekster miaj kapabloj, kvankam mi nur supraĵe notus, ke nur eta parto de la tuto, fakte optimisme troa, estas realigita. Mi rigardis kun simpatio la allogan siglon "AMO", kvankam laŭ mi ne temas pri maturigo de aktivuloj, kiuj jam estas maturaj per si mem, sed ja pri aktivigo de maturuloj, sed mi agnoskas, ke perdiĝus la ĉarmo se oni siglus MAO. Preter tiu ĉi ekstertema rimarko, mi limigas mian atenton al kelkaj punktoj rilataj al kulturo, spurante tiun vorton en la Apendico: "Strategiaj prioritatoj de UEA 2013-2017".

En la punkto 1.2 de tiu apendico estis planita la kreo de datumbazo de "Amikoj de Esperanto" al kiuj oni sendu movadajn novaĵojn. Mi dubas, ke tio estis kreita. Ankoraŭ en la tempo de Lapenna ekestis kategorio de "Apogantoj", kun listo kaj membrokartoj, sed post malmultaj jaroj tio estingiĝis. Analoge, la Akademio de Esperanto, en la tempo de la prezidanteco de Albault, kreis asocion de "Amikoj de la Akademio" kun la celo ricevi donacojn kaj informi pli vastan publikon ol la nuran membraron; tio estingiĝis kun la ŝanĝo de la prezidanto. Kvankam certe laŭdindaj en perspektivo, ĉi tiuj klopodoj iel partoprenigi en la idealoj de asocio personojn ekster la specifa medio ne funkciis. Retejo esperanto.net ŝajnis ŝlosilo al tiu etendo de la asocio al la ekstera mondo, sed ankoraŭ nun ĝi povas esti konsiderata funkcianta nur en sia esperantlingva versio, en aliaj lingvoj la retejo ankoraŭ atendas kompletigon. Kaj eĉ se rigardi la esperantan version, la mencio pri poezio nur de Kalocsay, Baghy kaj Miĥalski jam mortintaj antaŭ almenaŭ duonjarcento, kaj la nemencio almenaŭ de Boulton kaj Ragnarsson, kiuj, same kiel Auld, estis kandidatigitaj (ne ja "nominataj"???) al Nobel-premio pri literaturo estas for de aktualeco. Ŝajne freŝe aperintajn literaturkritikajn tekstojn la kompilinto de la retejo ne prikonsciis.

La libromerkato estas asfiksia, kaj la statistiko aperinta en la aprila numero de *Esperanto* estas deprima. Preter la eksplodaj *Poŝamiko* de Allée kaj Kováts kaj

*La danĝera lingvo* (2a eld.) de Lins, kiuj superas 200 ekzemplerojn, neniu verko atingas 80 ekzemplerojn venditajn en 2016 de la libroservo de UEA. Tamen veras, ke, laŭ aserto de spertulo kia Osmo Buller, nur duono de la tuta libromerkato pasas tra UEA, do la statistiko estas nur parta kaj por havi realan bildon oni devus statistiki la vendojn ĉe la eldonejoj (kio kompreneble ŝanĝus la klasifikojn de la plej vendataj entute), sed eĉ ĉi tiu nova bildo aspektus magra. Kiam Attila Kaszás alprenis la redaktadon de *Esperanto* li intencis starigi stabilan teamon de recenzantoj kaj al la sinproponintoj li sendis liston de la verkoj kuŝantaj ĉe UEA kaj atendantaj recenzon: ili estis 522, kaj pluraj malnovis jam pli ol dek jarojn. Evidente la recenza strukturo estas nekontentiga kaj nerecenzata libro riskas ŝimi en magazenoj; aliflanke la paĝoj en la revuo dediĉataj al recenzoj estas tro malmultaj, kvankam, nu, proporcie ĝustaj kompare kun la spaco en la revuo. La libroservoj, kaj ĉefe UEA kiel la plej granda, povus mem eldoni bitbultenon konsistantan nur el recenzoj, por iom movi la merkaton: elspezoj estus minimumaj, jam antaŭ ol vidi la libron fizike leganto estus informita kaj sur la tabloj de la libroservo dum kongreso li renkontiĝus kun konato. Ĉu la anoncita tute nova retejo, http://revuoesperanto.org kien ĉiu rajtu meti sian kontribuon, ŝtopos ĉi tiun enorman truon? Kompreneble ankaŭ por tio necesas reviziando, kiu eventuale bridu esprimojn pri kiuj UEA devas poste publike pardonpeti, kiel bedaŭrinde jam okazis antaŭ ne longe. Tiu retejo estas en la revuo indikita kiel loko kie oni trovu plenan liston de libroj venditaj, sed ĝis hodiaŭ tiu listo ne aperis.

Kiom da libroj eldoniĝas ĉiujare? En 2015 aperis ĉ. 150 presitaj verkoj. Por kompari, en Italio aperis ĉ. 67.000 libroj (inkluzive represojn), t. e. ĉ. 1,1 por ĉiu milo da landaj enloĝantoj (Italio randas 60 milionojn inkluzive bebojn kaj senkonsidere al vivantoj eksterlande). En Germanio preskaŭ same, ĉ. 1 por ĉiu milo. Se oni supozu la saman proporcion por la esperantlingva komunumo, tio rezultigus 150.000 legipovulojn, kio donus nombron ege pli malgrandan ol estas iuj sondoj, ekz. Vikipedio, kiuj klasas la eblajn konantojn (do utilajn por la libromerkato) inter 500.000 kaj 2.000.000. Kiu statistiko donas pli kredindan bildon? Se fakte legokapabluloj estus unu miliono, aŭ eĉ nur 150.000, la eldonnombro tamen estas mikrobdimensia: malmultaj eldonejoj aŭdacas aperi per pli ol 500 ekzempleroj, kio do rezultigus 75.000 legantojn (se ni konsideras ke la magazenoj regule malpleniĝas). Eble pli versimila nombro.

Inter la celoj kaj strategioj de UEA, se ĝi volas respekti sian epiteton “universala”, devus esti la kunlaboro kun aliaj esperanto-establoj, konigante ilian agadon, eĉ se ĉiu havas sian strategion: dise velas, kune celas. Tio ne okazas ĉiam: la rubriko *Laste aperis* registras ja ne tion kio laste aperis sur la terglobo, sed nur tion kio estas aĉetebla tiumomente ĉe UEA, kun la preteksto, ke se iu, vidante la anoncon pri aperigo, tuj alkurus per mendo, la libroservo ne estus preta lin kontentigi. Preteksto artifika, sufiĉus tuj ĉe la apero alproprigi al si ekzemplerojn. En la centraj jardekoj de la pasinta jarcento, laŭ tiama diro de Simo Milojević, UEA tuj mendis 20 ekzemplerojn de ĉio aperanta; ŝajne nun tio ne plu okazas: de *Homarane*, eldonita

de LF-koop, en la UEA-katalogo troveblas nur la unua numero (2010), aperis de jaroj jam la dua.

La Esperanta Civito komunikas, per tre ofta aperigo en sia gazetara agentejo HeKo, kulturajn eventojn aŭ festajn aktivadojn de establoj aliĝintaj al ĝia Pakto, sed tio neniam aperas en la UEA-eldonaĵoj. Kiel nura ekzemplo, la Literatura Kafejo, okazanta regule en Budapeŝto kaj atinginta ĉi-printempe sian 38an (!!!) realiĝon, neniam troviĝis en la UEA-kalendaro; same, pri kolokvo de la Kultura Centro Esperantista okazinta en Ĉaŭdefono en 2013, kiun partoprenis la tiama prezidanto de la Akademio, aliaj akademianoj, redaktoroj kaj kulturaj elstaruloj, aperis nek anonco nek raporto. La konstanta reprezentiĝo de la Esperanta PEN-centro en la internaciaj PEN-kongresoj kaj ĝia partopreno en gravaj komisionoj (ekz-e, tiu pri verkistoj en karcero) estas sisteme prisilentataj. La ĵus anoncita eksperimenta kurso en Ĉaŭdefono pri literatura tradukado ne estis relanĉita en la UEA-komunikoj, do eĉ esceptaj eventoj riskas nekonatecon. La strategiaj prioritatoj de la Laborplano devus raporti por doni kompletan bildon pri kio okazas en Esperantio.

Banale dirite, eldonejo estas la unua ekscianto pri apero de propraj verkoj (!), tial regula komuniko kun propono pri recenzo devus rapide alveni al la revuoj, kies malofteco jam estas grava handikapo por la diskonigo. Revuoj devus havi pretan teamon da bonvolaj (kaj kompetentaj) recenzantoj kaj tuj aŭ rekte atribui recenzotan verkon aŭ lanĉi enketon “kiu volas recenzi la verkon XXX?” kun ege sinteza priskribo, ĉu temas pri poezio, aŭ historio, aŭ kuirarto. Tion faras modele, ekzemple, *Monato*. Tamen, kiam mi proponis al iuj gravaj eldonejoj sendon de siaj eldonaĵoj por povi aperigi tuj recenzon en *Literatura Foiro*, la plej legata kaj plej longtradicia literatura revuo, kiu do restas kiel la plej instiga al aĉetado, de UEA mi eĉ ne ricevis respondon (kaj same de *Mondial*).

Mi finu per komento koncerne la politikon pri prezo de libroj, forte dependanta, preter la eldonlando kaj la eldonnombro, de la rabato al la revendistoj, kiu kutime dependas de la kvanto da mendataj ekzempleroj. Laŭ la nura ekzemplo kiun mi konas, LF-koop, eldoninto de la *Historio de la Esperanta Literaturo* de Minnaja & Silfer, proponas fortegan rabaton fronte al konsista mendo, sed eĉ kun malgranda mendo UEA ricevas 33,3%-an rabaton (se ĝi mendus eĉ nur 14 ekzemplerojn ĝi havus eĉ pli grandan). Bizare, en Lillo, kie tiu libro estis lanĉita, ĝi estis vendata en apuda urba internacia librejo je 3 eŭroj malpli ol ĉe la UKa libroservo. Je la demando pri kialo de tiu diferenco, s-ro Oneţ deklaris, ke UEA devas pagi imposton (kvazaŭ la urba librejo ne devus same). Hodiaŭ la UEA-katalogo ofertas ĝin je 54 eŭroj, dum la Itala Federacio je 48, kaj malgraŭ tiu forta diferenco la verko estas inter la dek plej vendataj de la UEA-libroservo. Evidente io malbone funkcias en la distribuado, kaj mi forte bondeziras, ke tio baldaŭ ŝanĝiĝu ankoraŭ antaŭ la fino de la Laborplano 2013-2017. Hipotezo pri bitlibra eldonado aŭ pri vendo tra grandaj ĉenoj, kia ekzemple Amazon aŭ ibs, estus interesa temo por la venonta trijara Laborplano de UEA.

# Lingvistika esploro pere de Esperanto en la universitato Ercıyes

Estas multaj esploroj pri la efiko de la denaska lingvo al la lernado de la dua lingvo. Tiaj esploroj montras, ke, kutime, kiam homoj lernas la cellingvon kaj trovas komunajn punktojn kun la denaska lingvo, ili transportas la pozitivajn konojn al la cellingvo, sed kiam la cellingvo estas tre malsimila al la denaska lingvo, tiam estas normala por ke ili transportu ankaŭ la negativajn konojn al la cellingvo.

Tamen la esploroj pri la efikoj kaj interagoj de la denaska kaj la dua lingvo al la lernado de la tria lingvo estas tre limigitaj. Ekzemple, laŭ la esploro de Selinker kaj Baumgarten-Cohen, farita en la jaro 1995*, trafa trovaĵo estis, ke kiam la denaska lingvo estas la angla kaj la dua lingvo estas la franca, dum la lernado de la germana, kvankam oni lernas kaj uzas bone la germanan sintakson, montriĝis ke en la uzado de la pronomoj kaj helpaj verboj la franca havas pli gravan efikon.

Surbaze de tio en la lernado de la tria cellingvo la kono de la posedataj lingvoj kaj la strukturo de la tria cellingvo evidente interagadas, sed estas demando: je kia amplekso tio okazas kaj kiaj estas la kialoj. Esplorado de tio riĉigos nian konon en tiu kampo.

Tiu laboro estas klasesploro pri la spertoj de la subjektoj kaj la malkovro de tio, kiel la tri lingvoj interagas dum la lernado. La subjektoj estas niaj studentoj, kiuj posedas la turkan kiel la denaskan lingvon kaj la anglan kiel la duan lingvon kaj celas lerni trian, antaŭe ne konatan lingvon, nome Esperanton, kiu havas la reputacion esti facile kaj rapide lernebla.

La nombro de la subjektoj estas 70 studentoj de la universitato Erciyes (Kayseri,



Turkujo), en la fako por instruistoj de la angla. Ili lernos Esperanton dum 14 semajnoj en la klaso kaj ekster la klaso. Ili regule registros en taglibro siajn spertojn kaj tion, kion ili lernis dum sia lernado de Esperanto. Ili faros tion kun kritika perspektivo kaj en la fino estos farita kunteksto-bazita analizo de la spertoj, pensoj kaj sentoj registritaj de la studentoj.

Poste la studentoj preparos materialojn kaj kreos lerno-planojn, per kiuj ili instruos Esperanton. Tiel, antaŭ ol fariĝi veraj instruistoj de la angla, ili spertiĝos ankaŭ en la kampo de instruado. Estos ankaŭ diskuto pri tio, ĉu la lernado kaj instruado de Esperanto helpas aŭ ne al la evoluado de ilia profesio.

Post 14 semajnoj kun niaj studentoj, kiuj lernis Esperanton kaj spertis instruadon, okazos grup-orientitaj kaj duon-strukturitaj intervjuoj por provizi kvalitajn datumojn por la pritakso de la procezo.

Ni atendas, ke tiu laboro klarigos temojn, kiel akirado de tria lingvo, edukado de instruistoj kaj evoluigo de profesio. La rezultoj de la laboro post iliaj analizado estos prezentataj en konferencoj kaj akademiaj eventoj kaj kunhavigataj kun aliaj akademianoj. Ni plue esperas, ke la rezulto publikiĝos kiel akademia artikolo.

**Dr. Erdem Akbaş**
Universitato Erciyes, Fako pri instruistoj de la angla, Kayseri, Turkujo
erdemakbas@erciyes.edu.tr

Tradukis **Vasil Kadifeli**

* Selinker L., & Baumgartner-Cohen B. (1995). Multiple language acquisition: ‘Damn it, why can’t I keep these two languages apart?’. In M. Bensoussan, I. Kreindler, & E. Aogáin (Eds.), Multilingualism and language learning: 8, 2. Language, culture and curriculum (pp. 115-123). Clevedon, UK: Multilingual Matters.

## Leterkesto

Tio funkciis: mi perfekte aliris al la 1a numero de la retgazeto *La Ondo*. Ĝi montriĝas brila; mi estas entuziasma. Ĝi por mi multe superas la paperan eldonon; pro mia aĝo mia vidkapablo multe malboniĝis; sed komputile mi povas laŭplaĉe grandigi la literojn kaj ege facile legi la tekstojn. Plie, la fotoj estas kolore multe pli brilaj, ol surpapere, kaj ankaŭ grandigeblaj laŭkonvene. Estas por mi vere granda kaj feliĉa surprizo; mi komprenas, ke multaj samideanoj bedaŭras la malaperon de la paperOndo; ankaŭ mi, pro tradicio. Sed ni ĉiuj konsentu, ke ne estas komparo: la retgazeto superas la tradician. Ni do sekigu niajn larmojn kaj hurau por la novnaskita infano.

**Jean-Luc Tortel** (Francio)

Mi salutas vin kaj ankaŭ la februaran numeron de nia revuo, ĉar ĝi estas kvante kaj kvalite tre riĉenhava. La kvanto estas rekta rezulto de la nova nurvirtuala formato. Do tio ankaŭ estas pluvaloro de la nuna situacio. Por mi ĉio enordas en la nova fazo.

**Luís Ladeira** (Portugalio)

# Per la angla lingvo la usona kaj brita imperioj sklavigis la mondon

**Zlatko Tišljar, estrarano kaj sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, aperigis en sia blogo artikolon, kiun li iomete redaktis por la publikigo en *La Ondo*. Nu, mi, kiel redaktoro, ĵuras, ke pretigante ĉi tiun kajeron, mi uzis neniun anglalingvan fonton, sed mi ne estas EUano… Ĉu niaj legantoj en EU kaj en aliaj mondopartoj samopinias kun samideano Tišljar? Komentoj estas bonvenaj… (La red.)**

La brita imperio dum kelkaj jarcentoj regis super perforte akiritaj kolonioj, sed iom post iom la britoj estis devigitaj rezigni pri la rekta regado kaj devis malkolonii siajn koloniojn. Sed restis tie ilia lingvo, per kiu britoj kaj Usono daŭre influas al la tieaj elitoj per siaj filmoj, novaĵoj kaj kulturo, rekte modulante la cerbojn kaj publikajn opiniojn en ĉi tiuj landoj.

Post la Dua Mondmilito, kiam la mondon komencis ĝendarmi Usono, ĝi uzis la britan sperton, investante multan monon en propagando de la angla lingvo ne nur tie, kie ili havis rektan influon, sed ankaŭ en preskaŭ ĉiuj aliaj lokoj. Post kvindek jaroj da konscia politiko influi lingve per sia kulturo (antaŭ ĉio filmoj kaj kanzonoj) ili sukcesis. Nuntempe neniu dubas, ke la monda lingvo estas la angla kaj ĉiuj estas spirite sub la influo de la idearo kaj pensmaniero de Usono. Nuntempe ĉiuj inform-agentejoj produktas novaĵojn nur el sia propra lingvo kaj el la angla, ĉar granda plimulto da ĵurnalistoj kapablas legi nur sialingve kaj angle kaj ĉerpi novaĵojn el anglalingvaj (sekve 95-procente el usonaj aŭ britaj) informoj.

Tiun tendencon almenaŭ parte kontraŭstaris Eŭropo. EU per sia politiko de mult-lingvismo proponis alispecan lingvan modelon kaj Francio plej forte rezistis kontraŭ la angla. Por venkigi kaj lingve sklavigi ankaŭ Eŭropajn ŝtatojn la Unuiĝinta Reĝo-lando en 1973 aliĝis al la Eŭropa Komunaĵo, kaj la angla iĝis unu inter la oficialaj lingvoj. Post kvardek jaroj ĉiuj en EU uzas nur la anglan kaj la internaciajn novaĵojn el usonaj kaj britaj fontoj. La celo estis atingita. EU estas lingve koloniita, same kiel ĉiuj aliaj, kaj iĝis spirita sklavo de Usono. Nun la rolo de Britio finiĝis kaj ĝi povis foriri. La EU-landaro ne plu povas rezisti al usonaj ordonoj.

**Zlatko Tišljar**



# La feliĉa Nordio




La 20a de marto estas anoncita de UN kiel la Internacia Tago de Feliĉo. Okaze de tiu Tago ĝuste la 20an de marto 2017 estis publikigita la Monda raporto pri feliĉo (World Happiness Report), kompilita de ekspertoj el Sustainable Development Solutions Network. Laŭ ĉi tiu raporto Norvegio kun 7 mil 537 poentoj estas la plej feliĉa lando en la mondo, kaj en la deko de la plej feliĉaj landoj estas ankaŭ Danlando, Islando, Finnlando kaj Svedio. La plej malfeliĉaj landoj estas Ruando, Sirio, Tanzanio, Burundo kaj Centrafrika Respubliko (CAR).

Ĉe la kompilado de la raporto oni esploris informojn pri 155 landoj kun konsidero de malneta pokapa enlanda produktado, sociala subteno de civitanoj fare de la ŝtato, daŭro de la sana vivo, libereco elekti vivgravajn decidojn, helpemo kaj rilato al korupto. Kvankam la tri lastaj kriterioj ne estas precize mezureblaj, UN ja publikigas ĝin, do vidu la komencon de la listo kaj kelkajn pliajn landojn kun relative forta Esperanto-movado.

1. Norvegio (7.537)
2. Danlando (7.522)
3. Islando (7.504)
4. Svislando (7.494)
5. Finnlando (7.469)
6. Nederlando (7.377)
7. Kanado (7.316)
8. Novzelando (7.314)
9. Aŭstralio (7.284)
10. Svedio (7.284)
14. Usono (6.993)
16. Germanio (6.951)
19. Britio (6.714)
22. Brazilo (6.635)
24. Argentino (6.599)
31. Francio (6.442)
34. Hispanio (6.403)
40. Slovakio (6.098)
46. Pollando (5.973)
48. Italio (5.964)
49. Ruslando (5.963)
51. Japanio (5.920)
52. Litovio (5.902)
54. Latvio (5.850)
56. Koreio (5.838)
66. Estonio (5.611)
67. Belarusio (5.569)
73. Serbio (5.395)
75. Hungario (5.324)
77. Kroatio (5.293)
79. Ĉinio (5.273)
89. Portugalio (5.195)
94. Vjetnamio (5.074)
108. Irano (4.692)
125. Kartvelio (4.286)
132. Ukrainio (4.096)
153. Tanzanio (3.349)
154. Burundo (2.905)
155. CAR (2.693)

Kurioze, lastatempe la esperantistaj mondkongresoj okazas laŭ malprogreso de la feliĉlisto: (3) Islando en 2013, (24) Argentino en 2014, (31) Francio en 2015, (40) Slovakio en 2016, (56) Koreio, (89) Portugalio. Kaj oni parolas pri planoj inviti UKon al la plej malfeliĉa Eŭropa lando Ukrainio kaj eĉ al Burundo.

**AlKo**

**La eldonanto kaj la redaktoro de "La Ondo de Esperanto" planas partopreni en la 33a ARKONES kiu okazos la 22-24an de septembro 2017 en Poznano http://www.arkones.org/eo**

# ***Arkivo***



***Antaŭ cent jaroj, la 14an de aprilo 1917 en Varsovio, tiam sub la milita regado de Germanio, forpasis Lazarj Markoviĉ Zamenhof. En la sekvaj paĝoj vi povas konatiĝi kun la lasta vivoperido de la aŭtoro de Esperanto.***

# Ho, mia kor', ne batu maltrankvile…

## de Aleksander Korĵenkov

**Okaze de la centa mortodato de Ludoviko Zamenhof, forpasinta la 14an de aprilo 1917, ni aperigas fragmentojn el la 16a ĉapitro de la dua eldono de *Homarano* (2011) de Aleksander Korĵenkov, en kiu temas pri la tri lastaj vivojaroj de la aŭtoro de Esperanto. La teksto estas iomete modifita por gazeta aperigo (ekzemple, estas forigitaj referencoj kaj notoj, kiuj ĝenus la legadon).**

La 1an de aŭgusto 1914 Germanio deklaris militon al Ruslando. Ludoviko Zamenhof kaj lia edzino, kiuj tiutage forveturis trajne el Berlino al Parizo, estis haltigitaj en Kolonjo. Oni anoncis, ke, kiel civitanoj de Ruslando, ili devos tuj forlasi Germanion. Ili do veturis tra la tuta lando al la orienta limo de Germanio, sed ĉar la limo inter Germanio kaj Ruslando estis fermita, ili devis reveni al Berlino kaj fari grandan ĉirkaŭvojaĝon, unue al la haveno Saßnitz (insulo Rügen), poste al Svedio, de tie tra Finnlando al Sankt-Peterburgo, kaj fine al Varsovio, kien ili venis la 15an de aŭgusto. Adam Zamenhof, tiam 26-jara kuracisto, rakontis pri la stato de sia patro post la reveno:

«Li revenis hejmen kun koro rompita ne nur en senco simbola. La grava kormalsano komenciĝis efektive en tiu ĉi malgaja epoko. Malgaja li rekomencis sian ĉiutagan laboron en Varsovio, ĉiam pli malgaja, kiam li vidis, ke la milito fariĝas ĉiam pli kruela kaj la espero pri baldaŭa fino estas pli kaj pli malcerta».

La 22an de novembro Zamenhof havis koratakon, kaj Adam telefone vokis doktoron Kunig, faman fakulon pri kormalsanoj. Tiu trovis la staton de la koro nekontentiga, kaj Zamenhof estis devigita resti en la lito dum kelkaj tagoj. Adam dum tiu tempo anstataŭis lin en lia laborejo, kaj post la resaniĝo de Zamenhof ili dividis la labortempon tiel, ke la filo akceptis pacientojn matene, kaj la patro dum du horoj posttagmeze. Ekde tiam Zamenhof povis fordoni sin al Esperanto ankaŭ matene, kaj ne plu devis labori nokte.

La tutan liberan tempon ekster la du laborhoroj li dediĉis plejparte al la tradukado de la Biblio kaj apenaŭ forlasis la hejmon. Finfine, la 3an de marto 1915 li skribis al la pastro Rust, ke la Malnova Testamento estas jam tute tradukita, sed pro la milito la sendado de la traduko estis prokrastita, kaj la Biblio aperis (kune kun la Nova Testamento) nur en 1926.

La domo en la kruciĝo de la stratoj Dzika (Sovaĝa) kaj Pawia, en kiu la Zamenhofoj loĝis ekde 1897, troviĝis en la centro de la kvara Varsovia kvartalo, kie 92% da loĝantoj estis judoj. La domoj en ĉi tiu kvartalo estis dense loĝataj, kaj en la teretaĝoj estis multaj butiketoj. En ĉi tiu juda kvartalo, plena de bruo kaj trafiko, mankis interesaj lokoj, kaj oni devis veturi per tramo aŭ droŝko por serĉi iom da verdaĵo kaj pura aero. Tiuj kondiĉoj ne estis bonaj por la malboniĝanta sano de Zamenhof, kaj liaj samfamilianoj konvinkis lin ekloĝi en alia kvartalo.

En julio 1915 la geedzoj Zamenhof forlasis la Sovaĝan straton kaj ekloĝis en la strato kun pli konvena nomo – Królewska, do, Reĝa strato. Zamenhof pasigis la reston de sia vivo en la komforta sepĉambra loĝejo №7 en la tria etaĝo (la dua, laŭ la okcidenteŭropa kalkulmaniero) de la bela domo №41 en la plej bona distrikto de Varsovio, proksime al la centra urba parko. Tie estis bonaj kondiĉoj por trankvila laboro, kaj li povis fari negrandajn ripozigajn promenojn. Kvankam lian kuracistan praktikon en la strato Dzika plene reprenis Adam, li ne konsentis tute ĉesigi sian praktikadon, sed nur malmultaj pacientoj estis allasitaj al lia kuracista kabineto kaj ili ne forrabadis al li la tempon, kiun li pli volonte uzis por sia kara ideo.

En la sama monato la Ruslanda armeo forlasis Varsovion, kaj la urbon okupis, feliĉe sen batalo, la armeo de Germanio.

Fininte la tradukadon de la Biblio, Zamenhof decidis unue traduki fabelojn de Andersen. Sed poste? Li deziris komenci sisteman tradukadon de diversaj plej famaj verkoj el la tutmonda literaturo kaj li ekserĉis eldoniston, kiu surprenus la financadon de tiu projekto. Krome, li volis, ke ankaŭ aliaj religiaj libroj estu tradukotaj, la korano kaj la sanktaj libroj de budismo, ĉar ĉiuj fondintoj de religioj “havis unu saman celon: ili volis igi pli bonaj kaj pli feliĉaj la homojn”. Sed tiujn verkojn traduku aliaj kompetentuloj, ne li. Ankoraŭ antaŭ la milito Bolingbroke Mudie petis lin, interalie, verki sian propran biografion.

Zamenhof tiam respondis: «Sisteman plenan aŭtobiografion mi nun ne povus publikigi; mi tamen jam delonge havas la intencon komenci (post la fintraduko de la Biblio, se mi tiam ankoraŭ vivos kaj estos laborkapabla) longan serion da artikoloj sub la titolo “Rememoroj kaj Meditoj». Sed, bedaŭrinde, dum la du jaroj da “post-biblia” vivo, li ne trovis la tempon por realigi ĉi tiun intencon.

Do, ankoraŭ en sia malnova loĝejo li eklaboris pri Andersen. La labormetodon de Zamenhof jene priskribis lia filo Adamo:

«En sia laboro li estis tre regula kaj sistema. Lia ĉiutaga tasko estis antaŭfiksita kaj devis esti nepre plenumita: tiom da paĝoj de traduko ĉiutage, tiom dum la monato. Mi ofte admiris la akuratecon, kun kiu la laboro estis finita laŭ la dato notita en la kalendaro je la komenco. Kaj se ekzemple tri tagoj estis fiksitaj por ĝoja ripozo post la fino de la traduko de la Biblio, la fabeloj de Andersen jam estis sur la skribtablo precize en la kvara tago».

Pro sia malsano li ofte interrompis sian laboron. Kaj la milita etoso ĉiam malĝojigis lin, kiu sian vivon dediĉis al la paca reunuiĝo de l’ homaro. Multaj esperantistoj

pereis, inkluzive de la prezidanto de UEA, Bolingbroke Mudie. Sed plej ĉagrenis Zamenhofon la morto de lia plej juna frato Aleksandro, kiu mortis la 18an de julio 1916 en Dvinsk (Vitebska gubernio de Ruslando; nun: Daugavpils en Latvio). Aleksandro estis iom aparta en la familio. Unue, li estis la sola fraŭlo inter la gefratoj. Due, en la familio li plej multe da tempo dediĉis al la juda problemo. Kiel adepto de la teritoriismo, doktrino celanta fondi la judan ŝtaton ekster Palestino, li pasigis kelkan tempon en la Suda Ameriko kaj fondis agrokulturan judan kolonion en Brazilo.

Zorgigis Zamenhofon ankaŭ lia filino Sofia, kiu, ricevinte la kuracistan licencon, eklaboris ĉe sia onklo Kadyŝ Senderoviĉ (Konstantin Aleksandroviĉ) Zilbernik en la urbo Lebedin (Ĥarkova gubernio de Ruslando, nun en Sumia regiono de Ukrainio). Pro la retiriĝo de la Ruslanda armeo Sofia Zamenhof ne povis reveni en Varsovion, okupitan de Germanio. Nur en 1922 ŝi revenis en Pollandon.

Dum kanonoj elokventas, muzoj silentas… La vivo esperantista, same kiel la kultura vivo, velkis dum la milito. Nur malofte esperantistoj venis al la Zamenhofoj. Inter la vizitantoj estis Leo Belmont, Odo Bujwid, Edward Wiesenfeld. Antoni Grabowski, kies familio restis en Ruslando, ekde aŭgusto 1916 regule venis al la Reĝa strato por legi fragmentojn el sia traduko de *Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz. Zamenhof kun intereso kaj plezuro aŭskultis kaj donis al Grabowski valorajn konsilojn. Ofta gasto estis ankaŭ la germana majoro kaj esperantisto Paul Neubarth, la havena komandanto de Varsovio. En decembro 1916 Varsovion vizitis Edmond Privat, kiu jene skribis pri sia lasta renkontiĝo kun Doktoro Esperanto:

«La paca geniulo timas, ke li ne povos plenumi la pli gravan parton de sia devo al homaro, t. e. la klopodo por starigi intergentan liberan fratecon. Ni ja scias, ke nur por tiu celo li donis al ni la lingvon, kiu sufiĉis por lin famigi kaj igi nin jam tre dankaj».

Zamenhof daŭre prilaboradis sian homaranismon, kaj du monatojn antaŭ la forpaso, la 15an de februaro 1917, li sendis ĝian lastan version al la germana advokato Ludwig Schiff. Li petis, ke Schiff traduku ĝin en la germanan kaj sendu ĝin al René de Saussure, por ke tiu aldonu la francan tradukon, presigu la tekston kaj dissendu ĝin al ĉiuj gazetoj de la mondo. Same kiel antaŭe, ankaŭ ĉi tiu konsistis el antaŭparolo kaj deklaracio. La antaŭparolo enhavis novan klarigon de la doktrino:

«Sub la nomo “Homaranismo” <…> mi volas paroli pri strebado al “homeco”, al forigo de intergenta malamo kaj maljusteco kaj al tia vivmaniero, kiu iom post iom povus konduki ne teorie, sed praktike al spirita unuiĝo de la homaro».
kaj klaran distingon inter la esperantismo kaj homaranismo (ambaŭ vortoj iĝis majusklaj):

«Dum la esenco de Esperanto estas politike kaj religie absolute indiferenta kaj la interna Esperantisma ideo prezentas nur nedifinitan fratecan *senton* kaj *esperon*, kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel, kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ilin, – la Homaranismo estas speciala kaj tute difinita *politika-religia programo*…»

Ĉi tiu programo estis proponota al kongreso homarana por doni al la homaranismo tian formon, ke ĝi, simile al apartaĵoj religiaj aŭ gentaj, povu fariĝi "afero aŭtomate hereda".

Li petis ne intermiksi la homaranismon kun kosmopolitismo, nek pensi, ke ĝi celas mortigi la ekzistantajn lingvojn kaj religiajn kredojn. Kaj, antaŭ listigi la homaranajn principojn, li faris interesan komparon:

«De la momento, kiam la homoj devigis sin submeti siajn personajn kaj familiajn idealojn al la idealoj de gento, el la reciproke batalantaj individuoj kaj familioj iom post iom fariĝis fortaj unuanimaj popoloj; ju pli multe da homoj devigos sin submeti siajn gentajn idealojn al la idealoj homaraj, des pli rapide el la reciproke batalantaj gentoj iom post iom kreiĝos potenca kaj konkorde laboranta homaro».

Unuavide, la lasta versio de la *Deklaracio pri Homaranismo* similas la antaŭajn. Ĝi similas, sed ne identas. Interesatoj komparu la tekstojn en MEH, sed nun ni notu almenaŭ du punktojn.

Unue, ne plu temas pri tio, ke "la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon", kion antaŭvidis la unua eldono de la homaranismo. Entute la stumbla termino *neŭtrale-homa* en Homaranisto-1917 estas uzita nur unu fojon. Nun temas pri strebado al "spirita unuiĝo de la homaro".

La dua punkto, lingva, estas tre interesa por la esperantistoj, ja temas pri laŭgrada malgraviĝo de la rolo de Esperanto en la homaranismo.

Laŭ la unua versio (Hilelismo, 1906), en ĉiuj hilelistaj kunvenoj kaj, laŭeble, en ĉiuj privataj komunikiĝoj kun hilelistoj oni devas uzadi la lingvon hilelistan, kaj, ĉar nuntempe tia lingvo estas nur Esperanto, oni uzu Esperanton. La bona hilelisto devis malagnoski la ekzistadon de la naciaj lingvoj kaj devis nomi sian hejman lingvon ne nacia, sed familia.

La dua versio (Homaranismo, 1906) ŝanĝis la epiteton "hilelista" al "homarana", sed la esenco restis la sama – inter la homaranoj oni devas uzadi Esperanton. Tamen aldoniĝis rimarko, kiu permesis al novaj homaranoj, kiuj ne posedas ankoraŭ la lingvon homaranan, uzadi en la kunvenoj aliajn lingvojn, sed ne altrudi ilin al la aliaj ĉeestantoj.

En la tria versio (1913) Esperanto ne estis nomita, kaj estis nur mencio, ke la homarano "devas posedi ankaŭ tiun neŭtrale-homan lingvon, kiun miaj samtempuloj uzas por rilatoj intergentaj". Por samregnanoj kaj samurbanoj tia lingvo povus esti lingvo regna, dum en tiuj regnoj kaj urboj, kie batalas inter si diversaj gentoj en la publikaj institucioj estu uzata lingvo neŭtrale-homa, aŭ almenaŭ krom la gentlingvaj kulturejoj tie ekzistu ankaŭ specialaj lernejoj kaj kulturaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa.

Esperanto ne estas menciita ankaŭ en la lasta versio (1917), kaj en ĝi mankas mencio ankaŭ pri la *neŭtrale-homa lingvo*: ĉiu havas rajton paroli iun ajn lingvon aŭ dialekton, sed en komunikiĝado kun homoj de aliaj lingvoj oni uzu lingvon neŭtralan. Tie, kie ne ekzistas intergenta batalado, por samregnanoj kaj samurbanoj la

rolon de lingvo neŭtrala povas ludi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la grandega plimulto de la lokaj loĝantoj. Sed tute nenio pri la lingvo en la lokoj kun batalo intergenta.

Kial tiu konscia marĝenigo de Esperanto? Eble Zamenhof konstatis, ke, malgraŭ la emfazado de Esperanto en la fruaj versioj de la homaranismo, al ĝi aliĝis neniu esperantisto, kaj li provis serĉi adeptojn ekster Esperantujo, ekzemple, inter tiuj kredoperdintoj, kiujn interesus aliĝo al la komunumo de liberkredaj homaranoj, sed kiuj ne volus aliĝi al la lingvokomunumo esperantista.


Unu el la lastaj fotoj de Zamenhof

La strebado al homeco, al forigo de intergenta malamo kaj al spirita unuiĝo de l' homaro estas afero multe pli ĝenerala ol la oferto de unu lingvo kaj unu religio por ĉiuj. Kaj la homaranisma ĉefprincipo (laste: "agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi") aspektas ne religia, sed morala. La strebado al la homeco kaj la praktikado de la menciita morala principo (ankaŭ la "toleremo" – implicita en la homaranismo, sed neniam rekte nomita) povus logi al la homaranismo ne tiom esperantistojn kaj religiemulojn, kiom la ordinarajn "progresemulojn", por kiuj problemoj lingvaj kaj religiaj ne estis la plej gravaj en la mondo.

Ni vidis, ke Zamenhof ĉesis doni la prioritaton al la judoj, por solvi kies problemon la hilelismo estis proponita en 1901 kun la sama morala principo, kiu restis ĝis 1917. La unua universala propono (Hilelismo 1906) ankoraŭ konsideris la interesojn de la Ruslandaj judoj, sed tiu konsidero poste malaperis. En la ĉiama interna batalado, pri kiu li skribis al Michaux en 1905, la *homo* Zamenhof fine venkis la *patrioton* Zamenhof.

La lastan version de la homaranismo Zamenhof intencis disvastigi ne en Esperantujo (li sensukcese faris tion en 1913), sed en la tuta mondo, ne per Esperanto, sed per la plej grandaj naciaj lingvoj. Ni scias, ke Esperanto estis nur parto de la pli ambicia projekto homaranisma. Ĉu ni kuraĝu diri, ke ĝi estis ĉiam malpli grava parto, kaj ke poste li malgravigus la interesojn de la esperantistoj, kiuj klare preferis la kongresecan Esperantujon, sed ne la strebadon al la spirita unuiĝo de la homaro?

Ni ne scias. La kvara versio restis la lasta…

Lia sano malprogresis. En decembro 1916 Edmond Privat trovis lin tia: «Lia koro ne funkciadis plu taŭge. Li nur mallaŭte povis paroli kaj malfacile spiri. Li ne rajtis plu kuŝi kaj devis nur sidi pro kuracista ordono. Ĝi fariĝis turmento».

Malgraŭ la malpermeso de kuracistoj Zamenhof multe fumis. Kelkfoje li provis ĉesi, sed ĉiam rekomencis fumi, ne nur ĉar li ne povis rezisti al ĉi tiu "malvirto", sed ĉar li tute ne kapablis labori sen la fumado. Kaj li kredis, ke li nepre devas labori.

Kelkajn semajnojn antaŭ la morto li ekverkis sian lastan artikolon *Pri Dio kaj pri senmorteco*, kiun li mem opiniis tre grava. Sed li ankaŭ antaŭsciis, ke lia subita kredantiĝo kaŭzos multe da kritiko:

«"Ĝis nun", oni diros, "li neniam parolis pri Dio nek pri senmorteco; li ne pasigis sian vivon en medio de kredantoj, li sekve alkutimiĝis al pensado libera; li estas kuracisto, kaj sekve jam la sciencoj, kiujn li studis, devis 'klare montri al li, ke Dio kaj senmorteco ne ekzistas'; do, se li nun volas paroli pri la ekzistado de Dio kaj de senmorteco, li estas aŭ nesincera, aŭ pro maljuneco kaj malsaneco lia mensa kaj psika stato ne estas normala"».

Por preventi tian kritikon, li antaŭklarigis, ke li havas neniun kaŭzon por esti nesincera kaj por hipokrite ŝajnigi, ke li kredas je Dio kaj je senmorteco. Male, li sciis, ke liaj konatoj nekredantaj taksos lin ridindulo aŭ strangulo, kaj ke en la mondo scienca kaj liberpensa li perdos ĉian estimon, kaj ke en la mondo de kredantoj li trovos nenian simpation, ĉar, kiel li skribis, "*mia* kredo estas tute alispeca ol *ilia* kredo"! Ankaŭ ne la antaŭmorta stato de la menso stimulis lin, ĉar la prezentotaj ideoj naskiĝis en lia menso jam antaŭ 40 jaroj, kaj

«malgraŭ ke mi de tiu tempo multe meditis kaj legis diversajn sciencajn kaj filozofiajn verkojn, miaj tiamaj ideoj pri Dio kaj pri senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis».

Zamenhof do decidis prezenti siajn ideojn pri la du plej gravaj filozofiaj problemoj, kvankam li ne estis filozofo. Li ne timis ridindigi sin per sia diletanta nescienca rezonado, ĉar li estus kontenta, se lia nova verko instigus al fruktodona meditado "tiajn personojn, kiujn fortimigus la dikaj kaj ofte malbone digesteblaj libroj de filozofoj-specialistoj".

Bedaŭrinde, la enkondukon sekvis nur unualinea priskribo de la fruinfaneca perdo de la religia kredo, pro kiu li komencis vidi sin kaj la aliajn kiel "nur sensencan pecon da viando, kiu kreiĝis oni ne scias pro kio kaj oni ne scias por kio, kiu travivos en la eterneco malpli ol plej malgrandan sekundeton, baldaŭ forputros por ĉiam, kaj dum ĉiuj venontaj senfinaj milionoj kaj miliardoj da jaroj ĝi jam neniam plu reaperos".

Krom tio restis nur folieto kun la skizo de la enhavo kaj du frazoj sur la dekstra marĝeno: "Mi eksentis ke eble ne malapero, eble la morto estas miraklo, ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ke io nin gvidas al ia celo…" kaj "ĉiuj verŝajne obtuze kredas, ĉar alie ilia vivo estus kiel vivo de besto".

Edmond Privat, unu el la lastaj vizitintoj de Zamenhof, kiu post lia morto interparolis kun lia vidvino kaj ricevis de ŝi la manuskripton, jene komentis:

«Mortante, Zamenhof forportis la sekreton sian. Ni nur scias, ke junule li ektrovis propran kredon, ke li akiris senŝancelan fidon, je unu forto komuna por amo kaj inspiro al konsciencoj, ke li tiel havis "Dion en la koro", ke li komprenis la daŭrecon de l' spirita laborado trans la morto, kaj rigardis la diversajn homajn religiojn kvazaŭ malsamajn vestojn de unu sama vero».

Kaj Privat citis el nekonata fonto frazon el mesaĝo de Zamenhof al kongreso de kristanaj gejunuloj:

«Mi estas nur hebrea homarano liberkreda; sed… kio pli bela en la mondo ol *plena* sekvado al instruo de Jezuo?»

Zamenhof ne sukcesis fini sian lastan verkon, ĉar li estis tiel malforta, ke estis al li malfacile skribi. Ni lasu al lia filo Adam rakonti pri lia forpaso:

«Kvankam li neniam plendis, ĉar li ne volis, ke iu alia ankaŭ suferu, kiam li suferas, tamen li aspektis tiel malĝoje kaj kompatinde, kiel neniam ĝis tiam ni lin vidis. Sed ŝajnas, ke ĝis la morto li ne tiom pensis pri si mem, kiom pri sia kara ideo, per kiu li volis feliĉigi la homaron, kaj li sentis sin vere malfeliĉa, ke pro la malsano li ne plu povis plenumi sian ĉiutagan taskon, kiu devis konduki lin al la venko.

« La lastan tagon de la vivo li fartis pli bone. Ŝajnis al li, ke li denove povos rekomenci la laboron, kaj tiu penso bone influis lian humoron. Sed lia koro ĉesis bati, eble en la momento, kiam li pensis:

« Ho, mia kor', ne batu maltrankvile…»

La koro de Lazarj Markoviĉ Zamenhof ĉesis bati posttagmeze la 14an de aprilo 1917. Post du tagoj okazis enterigo en ĉeesto de multaj judoj kaj esperantistoj. Rabeno Poznański, kiu antaŭ 15 jaroj prezidis la kunvenon, en kiu Zamenhof prezentis sian hilelismon al la kunlaborantoj de *Hacefira*, faris funebran paroladon. Sekvis paroladoj de Belmont, Grabowski kaj Neubarth. Post finkanto de la kantoro la malĝoje kantata himno ĉirkaŭsonis la malsupren glitantan ĉerkon, super kiu fermiĝis la tero.

La 16a de aprilo 1917. Varsovio. Funebra procesio en la Teatra strato.



# Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2017

**4.** Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Vilho Setälä** (1892-1985), konata finna fotisto kaj esperantisto, direktoro de Esperanto-Instituto de Finnlando de ĝia fondo (1920), fondinto de *Esperanta Finnlando* (1918) k ĝia redakoro ĝis 1973 (escepte de periodoj, kiam la gazeto ne aperis), komitatano de UEA (1920-63), dum 55 jaroj (1930-85) membro de la Akademio de Esperanto, prezidanto de EAF (1955-65). Aŭtoro de vortaroj kaj lernolibroj, interalie, de *Privilegia vojo al lingvoscio: Esperanto* (1960), kiu dum pluraj jaroj estis la plej furora libro en libroservo de UEA.

**11.** Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjajev** (1877-1933), ruslanda instruisto kaj rusortodoksa pastro, iniciatinto-ĉefredaktoro de *Enciklopedio de Esperanto*, aŭtoro de pluraj originalaj Esperanto-prozaĵoj inkluzive de *Sen titolo*, kiun kelkaj fakuloj konsideras la plej frua originala Esperanto-romano kaj la plej interesa el la fruaj romanoj verkitaj en Esperanto.

**14.** Antaŭ 100 jaroj mortis **Lazarj Markoviĉ "Ludoviko" Zamenhof** (1859-1917), la aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto (1887) kaj de aliaj lerniloj, tradukinto de pluraj beletraĵoj kaj de la Malnova Testamento, redaktoro de la unua Esperanto-gazeto *(La) Esperantisto* (1889-95), fondinto de la religia-etika doktrino homaranismo, nomita de siaj samtempaj esperantistoj La Majstro. Lia poemo *La Espero* estas la himno de Esperanto.

**15.** Antaŭ 105 jaroj en la katastrofo de "Titanic" pereis **William Thomas Stead** (1849-1912), angla ĵurnalisto, pacifisto kaj filantropo, pioniro de Esperanto en Britio, en 1902 fondinta Esperanto-rubrikon en sia revuo *The Review of Reviews.*

**22.** Antaŭ 40 jaroj mortis **Laksmishvar Sinha** (1905-1977), bengala instruisto, kunlaboranto de Rabindranath Tagore, eminenta barata esperantisto, farinta per Esperanto prelegvojaĝojn en Eŭropo, fondinto de Bengala Esperanto-Instituto (1963), aŭtoro de Esperanto-lernolibro por bengaloj (1974), tradukinto de la novelaro de Tagore *Malsata ŝtono*, kiu aperis en 1961 kiel la unua volumo de la libroserio "Oriento-Okcidento".


# Jam kvin jarkolektoj de *La Ondo* libere legeblaj

Antaŭ dek jaroj, en januaro 2007 komencis aperi la elektronika versio (laŭ la normo "pdf") de *La Ondo de Esperanto*. La redakcio post paso de kvin jaroj publikigas la malnovajn jarkolektojn. Kadre de tiu plano, en marto en la retejo de *La Ondo / Sezonoj* estis enretigitaj la pdf-versioj de ĉiuj numeroj de la 2011a jaro.

Nun kvin jarkolektoj de *La Ondo de Esperanto* (2007, 2008, 2009, 2010, 2011) estas libere elŝuteblaj kaj legeblaj:

http://esperanto-ondo.ru/Lo-old.htm

# *Kulturo*



***Okaze de Pasko, kiun ĉi-jare festas je la sama dato, la 16a de aprilo, la kristanoj de ĉiuj konfesioj kaj kalendaroj, ni aperigas la krestomatian Paskan rakonton (1898) de Leonid Andrejev (1871–1919). Pro ĉi tiu traduko Igor Sokolov iĝis laŭreato de la literatura konkurso Liro-2015 en la branĉo “Traduko el la rusa lingvo”.***

***Gajan Paskon!***

# Bargamoto kaj Garasko

## de Leonid Andrejev

Estus maljuste diri, ke la naturo mistraktis Ivanon Akindinoviĉ Bergamotov, kiu estis oficiale nomata “Policisto №20”, kaj neoficiale – simple Bargamoto. La loĝantoj de unu el la urborandoj de la gubernia urbo Orjol, pro sia loĝloko nomataj “kanonistoj” (laŭ la Kanonista strato), kaj en la spirita aspekto karakterizataj kiel “kanonistoj kun kapoj rompitaj”, donis al Ivano Akindinoviĉ ĉi tiun kromnomon, tute ne pensante pri la ecoj, apartenantaj al la subtila kaj delikata frukto bergamoto. Laŭ sia aspekto Bargamoto pli similis al mastodonto aŭ ĝenerale al unu el tiuj ĉarmaj sed pereintaj estaĵoj, kiuj pro spacomanko jam antaŭ longe forlasis la Teron, okupitan de feblaj hometoj. La alta, dika, forta, laŭtvoĉa Bargamoto estis rimarkinda figuro sur la horizonto de ĉi-urba policistaro, kaj li certe antaŭ longe atingus pli altan rangon, se lia animo, premita per dikaj muroj, ne estus en heroece profunda dormo. Eksteraj impresoj, penetrante en la animon de Bargamoto tra liaj mallarĝaj grasaj okuletoj, survoje perdis siajn akrecon kaj potencon kaj atingis la celitan lokon kiel malfortaj resonoj kaj rebriloj. Homo kun sublimaj pretendoj eble nomus lin karnopeco; la distriktaj inspektoroj titolis lin “ŝtipkapulo”, kvankam ja diligenta ŝtipkapulo. Sed por la kanonistoj — personoj plej interesataj tiurilate— li estis impona, serioza kaj solida viro, ĉiel honorinda kaj estiminda. Tion, kion Bargamoto sciis, li sciis bone. Ne gravas, ke tio estis nur la instrukcio por la stratpolicistoj, kiun li iam ellernis, streĉante sian tutan grandegan korpon, sed ĉi tiu instrukcio tiel profunde fiksiĝis en lia rigida cerbo, ke de tie ne eblis elpeli ĝin eĉ per plej forta vodko. Same firman pozicion okupis en lia menso kelkaj scioj, akiritaj per ĉiutaga sperto kaj senkondiĉe regantaj en la menciita distrikto. Pri tio, kion Bargamoto ne sciis, li silentis kun tia nefrakasebla solideco, ke la sciantoj kvazaŭ iom hontus siajn sciojn. Sed ĉefe, Bargamoto estis enorme forta, kaj en la Kanonista strato ĝuste la forto regis ĉion. La loka loĝantaro, konsistanta el ŝuistoj, kanabfibristoj, tajloroj kaj reprezentantoj de aliaj liberaj profesioj, havante je sia dispono du tavernojn, dimanĉojn kaj lundojn, kutimis dediĉi sian tutan liberan tempon al grandioza interbatalado, kiun partoprenis ankaŭ la edzinoj — taŭzitaj, senkaptukaj, penantaj disigi siajn edzojn — kaj etaj infanoj, kun admiro spektantaj la bravecon de siaj paĉjoj. Sed ĉi tiu sovaĝa ondo da ebriaj kanonistoj rompiĝis, kvazaŭ renkontinte ŝtonan bastionon, kontraŭ la neŝanceleblan Bargamoton, kiu nehaste kaptis per siaj fortaj manoj paron da plej aŭdacaj skandaluloj kaj mem kondukis ilin al la karcero. La skandaluloj humile konfidis siajn sortojn al Bargamoto, nur afektante proteston.

Tia estis Bargamoto en la fako de internaciaj rilatoj. En la sfero de interna politiko li kondutis ne malpli digne. La kliniĝinta kabaneto, en kiu Bargamoto loĝis kun siaj

edzino kaj du gefiloj, nur pene entenis lian pezan korpon, tremante pro la kadukeco kaj timo pri sia ekzisto, kiam Bargamoto turniĝis. Ĉi tiu ligna kabano eble ne povis esti certa pri sia firmeco, sed ĝi estis tute trankvila pri la firmeco de la familia vivo. La mastrumema, diligenta Bargamoto, ŝatanta libertempe labori en sia legomĝardeno, estis severa. Per la sama metodo de fizika influo li instruis la edzinon kaj la gefilojn, konforme ne tiom al iliaj realaj bezonoj pri lernado, kiom al malklaraj ideoj, kiuj vegetis en iu anguleto de lia granda kapo. Tio ne malhelpis al lia edzino Maria, ankoraŭ juna kaj bela virino, unuflanke, respekti sian edzon kiel homon seriozan kaj sobran, kaj aliflanke, malgraŭ ties korpulenta staturo, ŝi manipulis lin tiel lerte kaj forte, kiel kapablas nur malfortaj virinoj.

Proksimume je la deka horo de varma printempa vespero Bargamoto staris sur sia kutima deĵorloko ĉe la kruciĝo de la stratoj Kanonista kaj 3a Urboranda. Li estis mishumora. Morgaŭ estos la sankta festo de la Krista Resurekto, baldaŭ ĉiuj iros al la preĝejo, sed li devos deĵori ĝis la tria horo nokte kaj revenos hejmen nur al la komenco de la postfasta festmanĝo. Bargamoto ne sentis preĝemon, sed ankaŭ lin tuŝis la festa, hela etoso, disverŝita en la nekutime kvieta kaj trankvila strato. Li malŝatis la lokon, kie li ĉiutage trankvile staris dum jardeko. Li eĉ deziris fari ion festan, kion faras la aliaj. Interne de li, kiel malklaraj sentoj, estis leviĝantaj malkontento kaj senpacienco. Krome li estis malsata. Hodiaŭ lia edzino tute ne permesis al li tagmanĝi. Li nur glutaĉis simplan miksaĵon de kvaso kaj pano. Lia granda ventro insiste postulis nutraĵon, tamen ĝis la festmanĝo estis ankoraŭ longe!

— Pu! — Bargamoto kraĉis kaj, farinte cigaredon, eksuĉis ĝin sen iu apetito. Hejme li havis bonajn cigaredojn, kiujn al li donacis loka butikisto, sed ankaŭ ili estis rezervitaj ĝis la fino de la fasto.

Baldaŭ al la preĝejo ekiris kanonistoj: puraj, bonaspektaj, surhavantaj jakojn kaj veŝtojn super ruĝaj kaj bluaj lanaj ĉemizoj, piedvestitaj per altaj botoj kun multaj faldoj kaj grandaj kalkanumoj. Morgaŭ iuj el ĉi tiuj luksaĵoj trafos sur tavernajn vendobretojn, kaj aliaj estos ŝiritaj dum amikeca batalo por la harmonio, sed hodiaŭ la kanonistoj estis brilaj. Ĉiu el ili zorgeme portis tolan saketon kun paskaj kukoj. Neniu atentis Bargamoton, kaj ankaŭ li ne tre tenere rigardis al siaj “baptofiloj”, malklare antaŭsentante, kiomfoje li devos morgaŭ vojaĝi al la policejo. Fakte, li enviis, ke ili estas liberaj kaj iras tien, kie estos lumo, bruo kaj ĝojo, dum li devas staraĉi ĉi tie kiel malbenito.

— Jen, mi staru ĉi tie pro vi, drinkuloj! — li resumis sian meditadon kaj denove kraĉis, sentante malplenon en la stomako.

La strato senhomiĝis. La sonoriloj ĉesis voki al la meso. Post iom da tempo ĝoja sonorado onde ŝanĝanta sian tonon, tre gaja post la mornaj grandfastaj sonorilsonoj, disigis tra la mondo la bonan novaĵon pri la resurekto de Kristo. Bargamoto demetis sian ĉapon kaj krucosignis sin. Baldaŭ li revenos hejmen. Bargamoto gajiĝis, imagante la tablon, kovritan per pura tuko, paskajn kukojn kaj ovojn. Li nehaste gratulos ĉiujn per kisoj kaj ovoj. Lia edzino vekos kaj alportos Ivaĉjon, kaj la

etulo tuj postulos farbitan ovon, pri kiu li dum la lasta semajno serioze konversaciis kun sia pli sperta fratineto. La bubo malfermos pro miro sian buŝon, kiam la patro donos al li ne iun kolorperdeman ovon, farbitan per fuksino, sed marmoran ovon, kiun al li mem donacis la sama diligenta butikisto.

“Amuza knabeto!” — subridis Bargamoto, sentante, kiel io simila al la patra tenero leviĝas el la profundo de lia animo.

Sed la bonhumoro de Bargamoto estis rompita en plej kovarda maniero. El post la stratangulo aŭdiĝis malcertaj paŝoj kaj raŭka balbutado. “Kiun la sorto portaĉas ĉi tien?” — pensis Bargamoto, ĵetis rigardon postangulen kaj ekindignis tutanime. Estis Garasko! Jes, li mem kun sia ebria personeco — kvazaŭ li mankus ĉi tie! Kie li sukcesis ensuĉi alkoholon antaŭ la aŭroro — estis lia sekreto, sed lia ebriiĝo estis senduba fakto. Lia konduto, eble enigma por fremdulo, por Bargamoto, kiu konis la animojn de la kanonistoj ĝenerale kaj la fian naturon de Garasko speciale, tiu konduto estis tute klara.

Nerezistebla forto fortrenis Garaskon de la stratmezo, kie li kutimis defiladi, kaj premis lin al la barilo. Apogante sin ambaŭbrake kaj fikse-demande kontemplante la muron, Garasko ŝanceliĝis, kolektante la fortojn por nova lukto kontraŭ surprizaj obstakloj. Post nelonga intensa meditado Garasko energie forpuŝis sin de la muro, retiriĝis al la stratmezo kaj, farinte kuraĝan turnon, per larĝaj paŝoj impetis en la spacon, kiu evidentiĝis esti ne senfina, kiel oni asertas, sed en realo limigita per aro da lanternofostoj. Kun la plej proksima fosto Garasko tuj ekhavis plej intiman rilaton, forte kaj amike brakuminte ĝin.

— Ho, lanterno. Tpr! — kurte konstatis Garasko la okazintan fakton. Li estis nekutime bonhumora. Anstataŭ ŝuti al la fosto merititajn insultojn, Garasko adresis al ĝi mildajn riproĉojn kun iom familiara nuanco.

— Haltu, stultuleto! Kien vi? — li balbutis, jen retiriĝante de la fosto, jen denove tutbruste premiĝante al ĝi kaj preskaŭ platiginte sian nazon kontraŭ ĝia malvarma kaj humida surfaco. — Jen, jen!.. — Garasko, jam duone glitinta suben laŭ la fosto, sukcesis rektigi sin kaj enpensiĝis.

Bargamoto, malestime paŭtante rigardis al Garasko de la alto de sia staturo. Neniu alia en la Kanonista strato ĉagrenis lin tiel, kiel ĉi tiu drinkulo. Kvankam aspekte tre malforta, li estis la ĉefa skandalulo ĉi-distrikte. Ne viro, sed ulcero. Kutima kanonisto ebriiĝas, skandaletas, tranoktas en la policejo — kaj ĉio ĉi okazas en nobla maniero, sed Garasko ĉion faras kaŝe, sarkasme. Oni jam batis lin preskaŭ ĝismorte kaj tenis lin en la karcero preskaŭ senmanĝe, tamen oni ne sukcesis malkutimigi lin de lia insultado, tre ofenda kaj malica. Li kutimis proksimiĝi al la fenestroj de iu el la plej respektindaj personoj de la Kanonista strato kaj sakri tute senkaŭze, simple pro nenio. Komizoj kaptis Garaskon kaj batis lin, dum homamaso ridegis, konsilante draŝi pli fervore. Ankaŭ Bargamoton Garasko insultadis kun tia fantasta realeco, ke la policisto, eĉ ne komprenante la esencon de la aŭditaj spritaĵoj, sentis sin pli ofendita ol se oni vipus lin.

Per kio Garasko vivtenas sin estis por la kanonistoj unu el la misteroj, kiuj vualis lian vivon. Neniu vidis lin sobra, eĉ ne tiu vartistino, kiu pro neglekto kontuzas infanojn, pro kio ili odoras alkoholon* — ja Garasko eĉ antaŭ la kontuzo fetoris brandaĉon. Li loĝis, aŭ, pli ĝuste, noktumis en ĝardenoj, sur riverbordo, sub arbustoj. Vintre li ien foriris kaj reaperis kun la unua spiro de printempo. Kio logis Garaskon al la Kanonista strato, kie lin ne batis nur pigruloj, estis plia mistero de lia senfunda animo, sed oni neniel povis forpeli lin. Estis kaŭzoj supozi, ke Garasko ŝtelas, sed oni ne sukcesis lin kapti ĉe ŝtelo kaj batis lin nur surbaze de nerektaj pruvoj.

Verŝajne Garasko ĉi-foje havis malfacilan vojaĝon. Lian ĉifonaĵon, pretendantan vesti lian magran korpon, kovris ankoraŭ ne sekiĝinta koto. La fizionomio de Garasko kun la granda malsuprenpenda ruĝa nazo, kiu sendube estis unu el la kaŭzoj de lia malstabileco, kovrita per maldensaj, neregule kreskantaj haroj, vidigis evidentajn signojn de materiaj rilatoj kun alkoholo kaj kun pugnoj de proksimuloj. Survange, apud unu el la okuloj, videblis grataĵo, gajnita verŝajne antaŭnelonge.

Garasko finfine disiĝis de la fosto kaj rimarkis la majestan kaj silentan figuron de Bargamoto. Garasko ekĝojis.

— Nian saluton al vi, Bargamoto Bargamotiĉ!.. Kia estas via trezora sano? — Li faris galantan mangeston kaj, ŝanceliĝinte, por ĉiu okazo premis sian dorson al la fosto.

— Kien ci iras? — morne tondris Bargamoto.

— Nia vojo estas rekta…

— Ĉu ŝteli? Sed ĉu ci deziras en karceron? Mi tuj cin, kanajlon, kondukos tien.

— Vi ne povas.

Garasko volis fari bravecan geston, sed prudente detenis sin, kraĉis kaj ŝovis la piedon, kvazaŭ viŝante la kraĉaĵon.

— Babilu en la policejo! Marŝ'! — La forta manego de Bargamoto kaptis la grasmakulitan kolumon de Garasko. Ĝi estis tiel makulita kaj ŝirita, ke estis klare, ke Bargamoto evidente ne estis la unua gvidanto de Garasko sur la dornoplena vojo al virto.

Bargamoto skuetis la drinkulon por ĝuste direkti kaj iom stabiligi lian korpon, kaj ektiris lin al la menciita celo kvazaŭ fortega trenŝipo, tiranta leĝeran skunon, kiu rompiĝis ĉe la eniro al haveno. Bargamoto sentis sin profunde ofendita: anstataŭ meritita ripozo li devas nun eskorti ĉi tiun ebriulon al la policejo. Ho! Liaj manoj eĉ jukis, sed bremsis lin la penso, ke hodiaŭ, je tia granda festo estas nekonvene uzi la pugnojn. Garasko paŝis vigle, mirinde kunigante la aplombon kaj eĉ arogantecon kun humilo. Li evidente havis ideon, kiun li komencis disvolvi kiel Sokrato.

— Sed diru, sinjoro policisto, kiu tago nun estas?

— Prefere silentu! — malestime respondis Bargamoto. — Ebriiĝis antaŭ la mateniĝo.

— Sed ĉu oni sonorigis ĉe la preĝejo de ĉefanĝelo Mikaelo?

— Jes, sonorigis. Kiel tio rilatas al vi?

— Sekve Kristo resurektis, ĉu?

— Jes, resurektis.

— Do permesu… — Garasko, kiu ĝis nun parolis duonturninte sin al Bargamoto, rezolute frontis lin vizaĝ-al-vizaĝe.

Bargamoto, tre interesita pri la strangaj demandoj de Garasko, nevole ellasis lian grasan kolumon. Garasko, perdinte la apogpunkton, ŝanceliĝis kaj falis, ne sukcesinte montri al Bargamoto la ĵus elpoŝigitan aĵon. Duonlevinte sian torson kaj apoginte sin je la brakoj, Garasko ekrigardis suben, poste faligis sian vizaĝon teren kaj ekhurlis simile al kampulinoj, kiuj priploras mortinton.

Garasko hurlas! Bargamoto miregis. “Verŝajne, li elpensis novan ŝercon”, — li konkludis, tamen interesiĝis: kio sekvos? Sed Garasko plu hurlis senvorte, kvazaŭ hundo.

— Hej, ĉu ci freneziĝis? — Bargamoto puŝetis lin per sia piedo.

Garasko hurlis plu. Bargamoto enpensiĝis.

— Pro kio ci tiel disŝiriĝas?

— O-ve-to…

Garasko, daŭre hurlante, sed jam ne tiel laŭte, eksidis kaj levis sian manon. Ĝin kovris iu muko, al kiu algluiĝis pecetoj de farbita ovoŝelo. Bargamoto, plu embarasita, eksentis, ke okazis io malbona.

— Mi… noble… intergratuli… oveto… sed ci… — konfuzite balbutis Garasko, sed Bargamoto komprenis. Do, Garasko celis gratuli lin, laŭ la kristana moro, per ovo kaj kiso, sed li, Bargamoto, intencis treni lin al la policejo. Eble li alportis la ovon de malproksime, sed jen frakasis ĝin. Kaj nun ploras.

Bargamoto imagis, kvazaŭ la marmora ovo, kiun li gardas por Ivaĉjo, frakasiĝus, kaj kiel li, Bargamoto, bedaŭrus tion.

— Ho, kia okazaĵo! — Bargamoto balancis sian kapon, rigardante al la kuŝanta drinkulo, kaj sentante kompaton al tiu ĉi homo, kvazaŭ al sia frato, kiun kruele ofendus ties propra frato.

— Volis gratuli… Ankaŭ li estas animo vivanta, — balbutis la policisto, penante malgraŭ sia interna mallerteco analizi la situacion kaj tiun kompleksan senton de honto kaj kompato, kiu pli kaj pli premis lin. — Kaj mi jen… al la policejo! Jen kiel!

Kun peza ĝemo, frapinte sian sabron, nomatan “haringo”, kontraŭ ŝtonon, Bargamoto kaŭris apud Garasko.

— Nu… — li konfuzite murmuris. — Eble ĝi ne frakasiĝis?

— Ĉu ne frakasiĝis?.. Ci eĉ muzelon pretas frakasi. Idolano!

— Sed ci kial?..

— Ĉu kial?… — moke ripetis Garasko. — Mi al li noble, kaj li… al policejo. Eble ĉi tiu ovo estas la lasta ĉe mi, ĉu? Idolano!

Bargamoto brue spiregis. La insultoj de Garasko neniom ofendis lin. Per sia tuta mallerta esenco li sentis kompaton aŭ konsciencriproĉon. En la plej fora interno de lia grandega korpo io ĝene drilis kaj turmentis lin.

— Sed ĉu eblas ne bati vin? — demandis Bargamoto ĉu sin mem, ĉu Garaskon.

— Sed ci, birdotimigilo ĝardena, komprenu…

Garasko, videble, ekiris sian kutiman vojon. En lia iom klariĝinta cerbo konturiĝis larĝa perspektivo de plej tentaj insultoj kaj ofendaj moknomoj, kiam la enpensiĝe snufeganta Bargamoto per voĉo, kiu ne permesis eĉ iomete pridubi la firmecon de lia decido, deklaris:

— Ni iru al mi por la postfasta manĝo.

— Eĉ ne revu, dikventra diablo, ke mi iros al vi!

— Iru, mi diras!

La mirego de Garasko estis senlima. Li tute senreziste permesis levi sin kaj nun iris brak-en-brako kun Bargamoto… kaj kien iris? — ne al la policejo, sed al la hejmo de Bargamoto mem por tie… festmanĝi! En la kapo de Garasko fulmis tenta ideo — forgliti de Bargamoto kvazaŭ sur skioj, sed kvankam lia kapo klariĝis pro la neordinareco de la situacio, liaj “skioj” estis en la plej aĉa stato — ili kvazaŭ ĵuris ĉiam interkroĉiĝi kaj reciproke obstakli dum la irado. Krom tio, Bargamoto estis tiel bizara, ke Garasko fakte ne volis foriri. Pene movante sian langon, serĉante vortojn kaj konfuziĝante, Bargamoto jen rakontis al li la instrukcion por stratpolicistoj, jen revenis al la ĉefa temo pri batado kaj la policejo, samtempe traktante ĝin pozitive kaj negative.

— Vi ĝuste parolas, Ivano Akindinoviĉ… Maleblas ne bati nin, — konsentis Garasko, sentante eĉ ioman ĝenon: ja tre bizara estis Bargamoto!

— Sed ne, mi volis diri ne tion… — balbutis Bargamoto, komprenante verŝajne eĉ malpli ol Garasko, kion esprimaĉas lia mallerta lango…

Finfine ili venis, kaj Garasko jam ĉesis miregi. Maria komence larĝigis siajn okulojn, ekvidinte la neordinaran paron, sed laŭ la embarasita vizaĝo de la edzo konjektis, ke ŝi devas ne protesti, kaj dank’ al sia virina milda koro ŝi tuj komprenis, kion necesas fari.

Jen la perpleksa kaj silentiĝinta Garasko sidas ĉe la festa tablo. Li tiel hontas, ke pretas fali subteren. Li hontas siajn ĉifonojn, siajn malpurajn manojn, sian tutan memon — ĉifonan, ebrian, aĉan. Brogetante la lipojn kaj langon, li manĝas diable varmegan, grasan brasiksupon, preterverŝas ĝin sur la tablotukon, kaj kvankam la mastrino delikate ŝajnigas sin ne rimarki tion, li konfuziĝas kaj verŝas eĉ pli. Tre forte tremas liaj krudaj fingroj kun grandaj malpuraj ungoj, kiujn Garasko rimarkis kvazaŭ unuafoje.

— Ivano Akindiniĉ, kaj ĉu vi al Ivaĉjo… surprizeton? — demandas Maria.

— Ne necesas, poste… — rapide respondas Bargamoto. Ankaŭ li brogetas sin per la supo, blovas sur sian kuleron kaj solide viŝas siajn lipharojn, sed tra ĉi tiu solideco videblas la sama mirego, kiel tiu de Garasko.

— Manĝu, manĝu, — kuraĝigas Maria. — Gerasimo… kio estas via patronomo?

— Andreiĉ.

— Manĝu, Gerasimo Andreiĉ.



Garasko provas engluti tion, kion li havas enbuŝe, misglutas kaj, ĵetinte sian kuleron, faligas la kapon tablen, ĝuste sur la grasan makulon, kiun li ĵus kreis. El lia brusto denove eliĝas tiu lamenta kaj sovaĝa hurlo, kiu tiel konsternis Bargamoton. La infanoj, kiuj jam preskaŭ ĉesis atenti la gaston, ĵetas siajn kulerojn kaj soprane aliĝas al lia tenoro. Bargamoto konsternite kaj mizermiene rigardas al la edzino.

— Nu, kial vi, Gerasimo Andreiĉ! Ĉesu, — ŝi konsolas la maltrankvilan gaston.

— Kun la patronomo… Ekde mia naskiĝo… neniu alparolis min kun la patronomo.

Tradukis el la rusa **Igor Sokolov**

**Noto**:

* **… vartistino, kiu pro neglekto kontuzas infanojn, pro kio ili odoras alkoholon**. Temas pri jena citaĵo el *La revizoro*:

Urbestro. — via asesoro <…> sendube estas homo instruita, sed de li iras tia odoro, kvazaŭ li ĵus eliris el brandfarejo <…>

Ammos Fjodoroviĉ. — <…> li diras, ke en la infaneco la nutristino lin kontuzis, kaj de tiu tempo de li ĉiam iras iom la odoro de brando.

(Gogol N. *La revizoro* / Tr. L. Zamenhof. Akto 1, Sceno 1).

# Lepuileca, sed neniel liliputeca!




**Le Puil, Ĵak. *Sen elizi'*: KD. Donneville: Vinilkosmo, 2014, kun tekstolibreto.**

La franca kantisto Ĵak Le Puil (kiel li mem preferas nomi sin) estas jam delonge konata al la esperantista publiko: lia unua surkaseda albumo *Danĝera ul'* ekvidis la mondon jam en 1977. La kantisto realigas la stilon, kiun eblas kompari kun la tradicia rusa barda kant-arto: simplaj, sed ofte sinceraj melodioj, simpla gitara akompano, iom senzorga kantad-maniero, pli granda graveco de la tekstoj super la muziko. Krom la lirikaj pecoj al Ĵak estas propraj la protestaj kantoj; en lia kreado oni povas ofte trovi ankaŭ ŝercajn kaj eĉ obscenajn fragmentojn. Koncerne la devenon de la kreaĵoj Ĵak jen verkas/komponas mem, jen adaptas (helpe de plej diversaj tradukistoj) tradiciajn aŭ popu-larajn kantojn; nemalofte aperas inter liaj kreaĵoj la kantoj, komponitaj por la tekstoj de famaj esperantlingvaj poetoj.

La nun recenzata disko *Sen elizi'* (aperinta en 2014) estas tipe "lepuileca" kaj laŭ la stilo, kaj laŭ la enhavo. Ĝin konsistigas 14 kantoj, la plimulto el kiuj estis kompon-ita de Ĵak mem por la versaĵoj, interalie, de Eŭgeno Miĥalski kaj Marjorie Boulton. Enestas ankaŭ tri tradiciaj kantoj (interalie, la internacie konata itala *Bela ciao* en la traduko de Renato Corsetti) kaj du kanzonoj tradukitaj el la franca.

La ĝenerala sono de la albumo estas plaĉa kaj ekvilibra. Muzike dominas gitaro tamen kun fojaj harmoniaj aldonoj de balalajko, kontrabaso, mallaŭtaj drumoj kaj kelkaj blovmuzikiloj. La kantisto plenumas la vokalajn partiojn foje iom senzorge (tiel, ke aperas bona impreso pri intima viva plenumo), sed li kompensas tion per sufiĉe klara prononco (kvankam kun rimarkinda franca akĉento). La tekstoj, kiel kutime, estas tre variaj temare: oni povas trovi kaj la lirikajn, kaj ŝercajn, kaj soci-politikajn, kaj nostalgiajn fragmentojn. Kelkaj pecoj ja eble estas tre simplaj kaj muzike, kaj tekste, sed ili ege belas kaj eĉ kortuŝas, ekzemple, *Hejmo* (por la versoj de Marjorie Boulton) kaj adaptita kanto de Jean-Pierre Ferland *Revenas mi*.

Bedaŭrinde, en la tekstoj troveblas multaj kaj stilaj, kaj sintaksaj malglataĵoj, foje eĉ tro aŭdacaj (kiel, ekzemple, la formoj "blondino", "hodi'", "ankor'"; oftas ankaŭ la mispozicio de "ne": "eliru ne" anstataŭ "ne eliru", "deziras ne mi" anstataŭ la celita "mi ne deziras"). Ankaŭ mislokitaj akcentoj ne mankas, sed, feliĉe, vere krudaj eraroj, ŝajne, mankas. Ĝenerale la tekstoj estas relative simplaj kaj facile kompren-eblaj eĉ sen la helpo de la aldonita tekstolibreto.

Entute la albumo impresas tre vive kaj pozitive. Ĝi sendube havendas por la ŝatantoj de la "lepuileca" stilo, sed estas ankaŭ bona okazo por konatiĝi kun ĝi por tiuj, kiuj ne faris tion antaŭe. La relativa simpleco de la "lepuileca" stilo neniel estas liliputeca!

**Paŭlo Moĵajevo**

# Ricevitaj libroj

Ni aperigas la finan parton de la listo de la libroj, kiujn nia biblioteko ricevis donace de la societo “Internacia Esperanto-Muzeo en Wien”.
Dankon pro la donaco!

Ni memorigas, ke BibLO (= Biblioteko de *La Ondo*), fondita en 1998 surbaze de la privata kolekto de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, kreskas danke al donacoj, aĉetoj, interŝanĝo kaj per libroj, kiujn oni sendas por recenzo.

Donacemuloj kontaktu la bibliotekon rete: sezonoj@yahoo.com

Leser, Jolanthe. *La vivo estas pli forta* / Ed., antaŭpar. Herbert Mayer. – Vieno: Pro Esperanto, 1991. – 36 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №2).

Matthias, Ulrich. *Fajron sentas mi interne*: Originala romano / Antaŭpar. Elena Zaja. – Vieno: Pro Esperanto, 1990. – 108 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №1).

Montagut, Abel. *Karnavale* (Maskita rakonto). – Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1997. – 65 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №25).

Montagut, Abel. *Poemo de Utnoa* / Enkond. William Auld; Postpar. Probal Daŝgupto. – Vieno: Pro Esperanto, 1993. – 225 p., il. – (Serio *Originala Literaturo*, №7).

Privat, Edmond. *Pri Esperanta literaturo* / Ed., postpar. Herbert Mayer. – Vieno: Pro Esperanto, 1991. – 31 p. – (Serio *Originala Literaturo Klasika*).

Salovaara, Eija. *Kie boacoj vagadas.* – Vieno: Pro Esperanto, 1994. – 96 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №11).



Seabra, Manuel de. *Promeso en obskuro*: Noveloj. – Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1997. – 110 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №24).

Steele, Trevor. *Apenaŭ papilioj de Bergen-Belsen*: Originala romano pri Germanio. – Vieno: Pro Esperanto, 1994. – 152 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №10).

Steele, Trevor. *Aŭstralia Felix*: Noveloj. – Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1999. – 134 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №29).

Steele, Trevor. *Memori kaj forgesi: Noveloj el la Norda Montaro* / Antaŭpar. Herbert Mayer – Vieno: Pro Esperanto, 1992. – 143 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №5).

Ŝirjaev, Ivan. *La dormanta grafino*: Originalaj noveloj. Plena verkaro, Vol 1 / Ed., antaŭpar. Herbert Mayer. – Vieno: Pro Esperanto, 1993. – 157 p. – (Serio *Originala Literaturo Klasika*).

Ŝirjaev, Ivan. *La Nova Vivo*: Originala romano. Plena verkaro, Vol 2 / Ed., antaŭpar. Herbert Mayer. – Vieno: Pro Esperanto, 1993. – 80 p. – (Serio *Originala Literaturo Klasika*).

Štimec, Spomenka. *Geografio de miaj memoroj*. – Vieno: Pro Esperanto, 1992. – 140 p. – (Serio *Originala Literaturo*).

Štimec, Spomenka. *Kroatisches Kriegsnachtbuch* / Vorwort Ulrich Lins. – Paderborn: Ferdinand Schöningh, 1994. – 104 s.

Valano, Johán (ps. de Claude Piron). *Ĉu vi kurias ĉine?*. – 3a eld. – Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1996. – 135 p. – (Serio *Originala Literaturo*, №20).

Wüster, Eugen. *Enciklopedia vortaro Esperanta-germana. Unua parto. Kun speciala elmontro de la Zamenhof-a lingvuzo.* – Leipzig: Ferdinand Hirt & Sonh, 1923. – 24 + 136 p.

Wüster, Eugen. *Enciklopedia vortaro Esperanta-germana. Dua parto. Kun speciala elmontro de la Zamenhof-a lingvuzo.* – Leipzig: Ferdinand Hirt & Sonh, 1925. – 16 + 144 p.

Wüster, Eugen. *Enciklopedia vortaro Esperanta-germana. Tria parto. Kun speciala elmontro de la Zamenhof-a lingvuzo.* – Leipzig: Ferdinand Hirt & Sonh, 1926. – 26 + 134 p.

Wüster, Eugen. *Enciklopedia vortaro Esperanta-germana. Kvara parto. Kun speciala elmontro de la Zamenhof-a lingvuzo.* – Leipzig: Ferdinand Hirt & Sonh, 1929. – 6 + 162 p.

## Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2017/1; Esperanto, 2016/11,12, 2017/1; Juna Amiko, 2017/1; La Gazeto, 2017/1; La Lanterno Azia, 2017/2; La Revuo Orienta, 2017/2; Literatura Foiro, 2017/285; Monata Informilo de KCE, 2017/1; Monato, 2017/2; Norvega Esperantisto, 2017/1; REGo, 2017/1; Scottish Esperanto Bulletin, 2017/1.

# Lingvaj militoj en Galaksio




La unuiĝinta Tero, elirinta en la kosman spacon en la galaksia skalo, kunpuŝiĝis kun alia galaksiskala civilizo de brĵudoj, kaj komenciĝis la "stelmilito". "La brĵudoj, feliĉe al semantikistoj, havis longan historion de la komuna lingvo, al kiu nepre venas ĉiu unuiĝinta raso. Se post la dorso de la Nova Esperanto, kiun uzis la homoj, kuŝis nur du jarcentoj, do la malamiko parolis la solan idioman ja tiam, kiam en Eŭropo oni plu bruligis sorĉistinojn kaj opiniis Latinon la krono de lingvistiko".

Tio estas la mondo, kiun Dmitrij Kazakov priskribas en sia rakonto *Infera vermo*, publikigita en la kolekto *Perdita patrolo. La plej bona fantasta literaturo de 2017* (Moskvo, AST, 2016). La temo estas lingvistika: reciproka sabotado per influo je alies lingvo per enkonduko de nocigaj modaj vortoj kaj esprimoj – ekzemple, nepra indikilo de la jesaj frazoj en la brĵuda lingvo estas ŝanĝata per ekonduko de pli longaj esprimoj, similaj al "je la panjo ĵuras" aŭ "la denton oferas", kiu okupas pli da tempo kaj malpliigas la efikecon de interkomunikado – kaj, sekve, kondukas al kresko de perdoj dum bataloj. La brĵudoj, siavice, disvastigas kaj enmodigas poemojn, kies enhavo kondukas al detruo de la homa psiko…

Por ni speciale gravas, ke en la prezentata de la aŭtoro estonta homaro la sola interkomunikilo estas la Nova Esperanto, ĉiuj ceteraj lingvoj, kiel la rusa kaj angla, estas plene formortintaj! Kial Esperanto estas "nova", ne klaras, sed nenia negativa nuanco en la fakto pri la unueca homa lingvo en la verko senteblas.

**Nikolao Gudskov**

# *Literatura Foiro*, 2017, №285

La kultura revuo *Literatura Foiro* ampleksas ok paĝojn pli ol kutime en sia februara numero (285). Sed LF estas eksterordinara ankaŭ pro la enhavo kaj la grafiko, merito precipe de la ĉefredaktoro Zlatoje Martinov kaj de la asista redaktoro Perla Martinelli.

Daŭre fosante en la profunda minejo de la esperantistaj figuroj en alilingvaj literaturoj, ĉi tiu numero gastigas verkon de Miĥail Bulgakov *Samogona lago*, per la traduko de Mikaelo Bronŝtejn, kiu ankaŭ dediĉas eseon al la aŭtoro de *La Majstro kaj Margarita*.


Ankaŭ aliaj eseoj karakterizas la numeron: la dua kaj lasta parto de Carlo Minnaja *De Afero ĝis ĉaŭ*; de Fernando Pita pri surdmutulaj lingvoj; de Vinko Oŝlak per platoneska dialogo pri la ekzisto. Prozo forte ĉeestas: la balkana, danke al traduko de Zlatoje Martinov el Adin Ljuca; delikata rakonto de Antonio Della Rocca, tradukita de Perla Martinelli; psikologie interesa novelo de Julian Modest; rememoroj de Carmel Mallia.

Kompletigas la panoramon pluraj recenzoj kaj poezia uverturo de Nicolino Rossi.

**HeKo**

# Mozaiko

***La redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al kunlaboro en la sekcio "Mozaiko" karikaturistojn, humuristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.***



# Pri kiu temas?

En ĉi tiu konkurso Valentin Melnikov verse prezentas dek konatajn esperantistojn, kaj via tasko estas diveni la nomojn de la prezentatoj. Post aperigo de dek versportretoj ni resumos la rezulton. La plej sukcesa divenanto ricevos ekzempleron de la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, kiun ĉi-aŭtune eldonos *Sezonoj* (Kaliningrado, Ruslando).

## Valentin Melnikov

### *Versportreto 7*

Ne tro facilas ŝia vivo-pado:
mastrino de l' retej' pri edukado
el Hungari' al Nederlando venis,
instruis multe, gvidis, ekzamenis,
disertaciis pri propedeŭtiko,
kaj dank'al ŝi aperis Poŝamiko;
La stelsemantoj en la ora nordo
en ŝia libro vivas en agordo.
Sindone kaj senlace ŝi laboras.
Jen tiaj homoj vere plej valoras!

La respondoj atingu la redakcion antaŭ la 20a de majo 2017.



**La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn**

**http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm**

# Pri kio ridis Zamenhof

**Redaktante la unuan Esperantan gazeton *La Esperantisto,* Zamenhof prizorgis ankaŭ la humuran rubrikon *Bagateloj*. Evidente li aperigis tiujn ŝercojn, kiujn li ŝatis. Legu do, pri kio ridis la tridekkelk-jara Ludoviko en la foraj jaroj 1890aj.**

**Zorgo**. Vi estas tiel malgaja, al vi kredeble faras zorgojn viaj kreditoroj? – Jes, miaj kreditoroj estontaj, ĉar mi ĉiam zorgas, de kiu mi nun povos ankoraŭ prunti.

**Diferenco**. Kia diferenco estas inter la unua amo kaj la lasta? – Pri la unua amo oni ĉiam pensas, ke ĝi estas la lasta, kaj pri la lasta oni ĉiam estas konvinkita, ke ĝi estas nur la unua.

**El la histori**o. A: Kial Hanibalo iris trans la Alpojn? – B: Ĉar tiam la tunelo ne estis ankoraŭ preta.

**En la juĝejo**. Juĝanto: Kiel oni vidas el la preparaj aktoj, la ŝtelado estas via profesio! Juĝato: Kion do vi volas, sinjoro juĝanto, ke mi ŝteladu por *plezuro*?

**Telegrama stilo**. Juna edzino naskis filinon. La edzo volis sciigi la patron de sia edzino pri tiu ĉi fakto, aldonante, ke la fakto havis lokon en la sepa horo matene kaj ke poste per letero li skribos pli detale. Li telegramis: "Hodiaŭ matene sepa filino naskita. Poste pli".

**La pafanto**. Leŭtenanto: "Ni supozu, ke la malamiko staras tie ĉi antaŭ la arbo. Laŭ la komando "tri" vi ekpafos sur la arbon. Sekve atentu: unu – du – tri!.. Ha, mallerta urso, vi pafis ja *preter* la arbon!" – Rekruto: "Nu, kion do ĝi malutilas, sinjoro leŭtenanto? Kiam la malamiko efektive venos, tiam ja certe ne ĉiuj staros *antaŭ* la arbo, kelkaj staros ankaŭ *apud* la arbo!"

**Antaŭfesta morto**. Edzino demandas sian edzon, kiel longe ŝi vivos. Li respondas: "Kiel longe vi vivos – mi ne scias, sed en kiu tago vi mortos – mi scias: vi mortos en la antaŭtago de festo." – "De kie vi scias tion ĉi?" – "Ĉar morgaŭ post via morto mi faros feston", li al ŝi respondis (M. Jezerski)

**Dupieda leono**. Juna kaj tre bela dresistino de leonoj permesis al leono preni pecon da sukero el ŝia buŝo. – "Tion povas ankaŭ mi fari", diras spektanto. – "Kio, vi, malforta junulo?!", respondis la dresistino. – "Jes, egale bone kiel la leono". (O. J. Olson)

**Mi ne komprenas**, kiel oni povas plendi ĉiam pri la tro karaj viandokostoj! Mi kaj mia familio estas kune dektri personoj, kaj tamen sufiĉas por ni 1½ funtoj da viando por tago. Mia edzino ne manĝas ĝin, miaj naŭ infanoj ne ricevas ĝin kaj la du servantinoj ne bezonas ĝin. Jen en tia maniero la 1½ funtoj tute sufiĉas por mi por la tuta tago. (Dumpert)

Plukis **Halina Gorecka**

# Spritaj splitoj kaj preskeraroj

## *El la kolekto de reduktoro*

### *Kurta rimeno por Marta Gimeno*

Pli kaj pli intensa la formado de Civitaj kadroj… F-ino Marta Gimeno estas trejnata lingve kaj ideologie en Ĉaŭdefono, fare de la Vickonsulo: ŝi… probable ricevos profundigon en Belgio… (HeKo 632 9-C, 5 feb 2017, http://esperantio.net/index.php?id=3094)

### *Civitaj kadroj aktivu proprahejme*

La kadroj en formado aktivos… ne kiel burokratoj, sed kiel buralistoj: personoj aktivantaj en diversaj lokoj, precipe en la propra hejmo. (*Preparata la nova responsulo pri la esperanta tempobanko*, HeKo 633 4-C, 10 feb 2017, http://esperantio.net/index.php?id=3099)

### *Finofara frazofino?*

La Vickonsulo faris la punkton pri la situacio ses monatojn post la brita referendumo (*Radio Radikala intervjuis la Vickonsulon pri Brexit*, HeKo 630 4-E, 11 jan 2017, http://esperantio.net/index.php?id=3071)

### *Demokratio malsimple modlas*

… la forigo de la ratifo de statumodifoj fare de membrara referendumo. (*Hispanoj (kaj aliaj) malamikas al TEJO*, HeKo 632 3-A, 27 jan 2017, http://esperantio.net/index.php?id=3088)

### *Pro voltrudo baŭmas Raŭmo*

… antiraŭmistoj … kiel kutime, kaze de manko de argumentado… glitigas la diskuton al banalaj vortludoj … (*La malkapablo argumentadi de la antiraŭmistoj*, HeKo 633 3-A, 8 feb 2017, http://esperantio.net/index.php?id=3097)

### *Herodo hejme en Biblio*

La esperanta traduko de la Malnova testamento. – Scheveningen: Herodo de esperanto, [1958]. – XII, 57 p. (Archivio di Stato di Massa, Biblioteca Nazionale di Esperanto, Catalogo dei volumi a stampa ordinati per titoli, majo 2008, p. 116)

### *Humidaj pariĝoj*

… ni malsekiĝis … ĉiu trovis ŝatatan likvaĵon … kun la paroprenantoj eblis abunde paroli nian belan lingvon. (Kia estis la 11-a BIERo?, http://www.e-mental.cz/archiv/11463, rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

### *a Kor'?*

En la unua tago estis prelego pri Koreio kaj ĉi-jara UK ĉe la kulturcentro Ho Mi. (Reza Kheirkhah: *Komuna staĝo de koreaj kaj tajvanaj Esperantistoj // La Ondo de Esperanto*, 2017, №3, p. 19)

Plukis **István Ertl**

# Kiel aboni *La Ondon*

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm.

## Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

**Argentino**: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

**Aŭstralio**: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

**Aŭstrio**: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

**Belgio**: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

**Brazilo**: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

**Britio**: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

**Bulgario**: Georgi Mihalkov, «Nadeĵda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

**Ĉeĥio**: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

**Ĉinio**: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

**Danlando**: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

**Estonio**: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

**Finnlando**: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

**Francio**: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

**Germanio**: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: schwanzer@esperanto-buchversand.de.

**Hispanio**: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

**Hungario**: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Hungario**: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Irlando**: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

**Islando**: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

**Italio**: Itala Esperanto-Federacio, Via Viloresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

**Japanio**: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tôkyô-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio**: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

**Koreio**: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

**Kroatio**: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

**Latvio**: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

**Litovio**: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Meksiko**: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

**Nederlando**: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

**Norvegio**: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

**Nov-Zelando**: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

**Pollando**: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

**Ruslando**: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

**Serbio**: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

**Slovakio**: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

**Svedio**: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

**Svislando**: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

**Usono**: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

***Neniam sendu monon en kovertoj!***




# BANSKÁ ŠTIAVNICA (SK)

## 15 - 23 julio 2017

**Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!**

Somera Esperanto-Studado (*SES*) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj **komencantoj** kaj **progresintoj** kun riĉa distra programo.

► **Por informoj kaj aliĝo vizitu:** **http://ses.ikso.net**